

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

2  
1972


Junulinoj de Liuĝuang-brigado de Kilijing-komunumo, Hin-  
hiang-gubernio, Henan-provinco ĝoje kolektas kotonon.






# Nova Fizionomio Videblas

## Ĉie en Nia Kamparo



Juŝu-gubernio de Gilin-provinco akiris riĉan rikolton de greno kaj sojo. Jen kamarado Haŭ Ŝeng (la dekstra), vicsekretario de la partia komitato de Gongpengzi-komunumo, interkonsiliĝas kun kadroj de baza nivelo, kiel bone sunumi kaj konservi sojon.



Unu el la kultivejoj de Hejlonggiang-provinco sunumas tritikon por vendi ĝin al la ŝtato.








Paŝtistoj de Najitu-komunumo de Ĝenglan-flago de la Interna Mongolio loĝiĝis en novajn domojn kaj finis nomadan vivon.






Supre maldekstre: La vasaj amasoj de fiŝistoj de Pirgtan-gubernio. Fugian-provinco aktive disvolvas bredadon kaj kultivadon en maro kaj en 1971 refoje akiris riĉan rikolton de laminaĵo.



Supre meze: En 1971, la totala enspezo de Bajjangju-brigado de Hijang-gubernio de Ŝanhi-provinco estas duoblo de tiu de 1966. Nun en la brigado pleniĝas la grenejoj kaj prosperas greĝoj.

Supre dekstre: Hintan-komunumo de Ŝejang-gubernio de Giangsu-provinco transformis salajn kaj alkalajn terojn en grasajn kampojn kiuj donas riĉajn rikoltojn spite al sekegeco aŭ inundo.





La irigacia kanalo venke finkonstruita en Baŭgi-ravino en Ŝenhi-provinco povas irigacii, per akvo de Vej-rivero, pli ol 113.000 hektarojn da kampoj de la seka altebenejo norde de la rivero.



# Bejjuan-a Popola Komunumo en Antaŭenmarŝo

**A**ŬTUNE, la vastaj rizkampoj de la Bejjuan-a Popola Komunumo en la antaŭurbo de Ginnan, Ŝandong-provinco ore flavis kaj riza aromo ŝvebis en zefiro. Estis ree riĉa rikolto. Ĉiufoje dum riĉa rikolto, kun senkompara emocio la komunumanoj ĝoje rememoris la feliĉan scenon, ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone inspektis Bejjuan kaj montris al ili la larĝan vojon de popola komunumo.

Je la 9-a de aŭgusto 1958, Prezidanto Maŭ en brila sano kaj vigla animstato venis al Bejjuan. Li iris inter la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn surkampe laborantajn, kore manpremis kaj varme interparolis kun ili. Kiam la kadroj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj raportis, ke ili intencas kunigi kelkajn najbarajn agrikulturajn kooperativojn en grandan kultivejon por plie disvolvi agrikulturan produkton, Prezidanto Maŭ antaŭvide montris, ke **“bona estas la popola komunumo”**. Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Bejjuan rapide starigis la unuan popolan komunumon en Ŝandong kun karaktero de baza registaro kaj produkta administracio en kombino — la Bejjuan-a Popola Komunumo.

Bejjuan antaŭe estis loko malriĉa kaj postrestinta. En la malnova socio de duonkolonia kaj duonfeŭda Ĉinio, la bejjuan-anoj suferis de kruela subpremo de la reakcia kuomintanga registaro, mankis al ili manĝaĵoj, vestoj kaj homrajtoj. Post la Liberiĝo, respondante la grandan alvokon de

Prezidanto Maŭ **“Organiziĝu”**, ili starigis interhelpajn grupojn kaj poste agrikulturajn kooperativojn, tiel ke la produkto ricevis certan disvolvon kaj la vivo pliboniĝis grade.

En la unua vintro post sia stariĝo, la Bejjuan-a Popola Komunumo komencis reformi Bejdava-marĉon kun areo de 267 hektaroj.

Bejdava estis malebena, tute kovrita de fragmitoj kaj nekulturebla. Post la starigo de agrikulturaj kooperativoj, la bejjuan-anoj plurfoje interkonsiliĝis por ĝin reformi. Sed tiam la marĉo apartenis al 5 agrikulturaj kooperativoj, tial oni ne povis kune fari plenampleksan planon kaj aranĝon, kaj neniu el ili povis unuope fari tiel grandan konstruadon pro nesufiĉo de laborfortoj kaj mono. Tial ĝis la starigo de la komunumo oni kulturebligis nur 20% de Bejdava-marĉo kaj la pomua produktokvanto de greno estis nur pli ol 50 kg. En 1958 la 5 agrikulturaj kooperativoj partoprenis en la Bejjuan-a Popola Komunumo kaj la kolektiva forto grandiĝis. La komunumanoj decidis ekspluati virgan teron por produkti pli multon da greno kaj legomoj por subteni socialisman konstruadon de la patrolando.

Li Ŝuĉeng, sekretario de la partia filio de Ŝujtunbrigado, kiu iam feliĉe vidis Prezidanton Maŭ, estis komandanto en reformado de Bejdava-marĉo. La kora zorgo de Prezidanto Maŭ al la bejjuan-anoj donis al li grandan inspiron. Sub lia gvido, la komandejo plurfoje petis opiniojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, post

ĉeloka esploro kaj projektado, ĝi organizis mil homojn por reformi la marĉon.


La komunumanoj unue elfosis fragmitajn radikojn en la marĉo kaj poste ebenigis la teron. Ili alportis teron de malproksimaj lokoj por altigi la malaltan tersurfacon. En unu vintro ili jam transformis la marĉon en ebenajn rizkampojn kaj lotuskultivejojn movinte pli ol 200,000 kubmetrojn da teraĵo. Krome, ili ankoraŭ konstruis irigacian sistemon de kelkaj kanaletoj kun multaj branĉoj. De tiam ĉiujare oni povas rikolti tritikon kaj poste rizon en tiuj kampoj kaj la pomua produktokvanto de greno superis 500 kg.

La 24 produktaj brigadoj de Bejjuan-komunumo apud la Flava Rivero havis pli ol 800 hektarojn da salalkalaj malaltaj kampoj ofte inundataj. En la pasinteco printempe ĉie blankis salo kaj alkalo, somere vastis akvo, la plantoj mortis de

salo kaj alkalo aŭ de superakvego. La popola komunumo kun pli granda laborforto pretigis kondiĉojn por grandskala reformo de salalkalaj kampoj.

En 1964, sub la gvido de sia partia filio la komunumanoj de Dingtajlu-brigado de tiu komunumo alkondukis akvon de la Flava Rivero kaj akiris sukceson en forlavado de salalkalo kaj irigacio kaj kulturo de rizplantoj. Ilia ago stariĝis bonan ekzemplon por aliaj brigadoj. Je la sekvinta vintro, laŭ la ampleksa projekto de la komunumo kaj sub ĝia gvido, pli ol 5,000 komunumanoj disvolvis vastan batalon por reformi la salalkalajn kaj malaltajn kampojn sur tereno de ĉ. 90 kvadrataj kilometroj.

Estis vintro. Hurlis norda vento kaj flirtis neĝflokaj. Sur la konstruejo la komunumanoj laboris fervore. Ĉar la akvo de la Flava Rivero





enhavas relative multan leŭson, oni devis unue konstrui sedimentejojn por redukti la leŭson. Por fosi sedimentejojn Davej-brigado sendis nur 200 personojn laŭ aranĝo de la komunumo. Sed komunumanoj hejme restantaj konkure venis al la konstruejo por fosi teron, rami la bazon kaj konstrui digon. Ankaŭ onklino Vu Ŝijing, kiu multe suferis kiel infanfanĉino en la malnova socio, alrapidis por laboro. Oni persvadis ŝin reiri hejmen por ripozo, sed ŝi diris: "La popola komunumo estas luma ŝoseo al ni montrita de Prezidanto Maŭ, mi nepre kontribuos mian forton al ĝi, kiel ajn peniga estas la laboro."


El la komunumanoj de aliaj brigadoj iuj iris sur monton por dehaki kaj transporti ŝtonojn por konstrui kulvertojn kaj tunelojn, aliaj klopodis lerni masonadon por konstrui digon. En la printempo oni jam finkonstruis 3 sedimentejojn, 4 irigaciajn kanalojn kun totala longeco de 25 km.

kaj pli ol 150 kulvertojn kaj tunelojn kaj reformis malebenajn alkalajn kampojn en ebenajn rizkampojn.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, prenante la komunumanojn de Daĝaj-brigado kiel modelojn, la membroj de la Bejjuan-a Popola Komunumo pluapaŝe levis tajdon de lernado pri la brilaj "tri popularaj artikoloj" de Prezidanto Maŭ por firme starigi la penson terkulturi por la revolucio kaj akiris novan sukceson.

Ŝandong-brigado estas unu el tiuj, kiuj akiris rimarkindajn sukcesojn en la batalo. Ĝi situas sur la norda bordo de la Flava Rivero kaj estas en la plej malbonaj naturaj kondiĉoj de la tuta komunumo. Pli ol duono el ĝiaj 1,000 muoj da kampoj estis sur sablejo de la Flava Rivero. Sablaj montetoj puŝataj de vento senĉese moviĝis norden kaj la agroj reduktiĝis jaro post jaro. Lerninte la


*Antaŭaj malaltaj alkalaj kampoj de Dingtajlu-brigado nun turniĝis en fruktodonajn rizkampojn.*



brilan verkon «Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo», la komunumanoj likvidis la eraran penson de iuj homoj pri senfaro antaŭ la naturo kaj eltrovis rimedon por fari kontraŭsabloventan forstumon inter sablejoj kaj kampoj.

Forstumo sur sablejo ja estas tre malfacila. Estis ofte tiaj okazoj: Kavoj tage fositaj, en kiuj oni ankoraŭ ne plantis arbidojn, nokte jam estis plenigitaj de sablo. Jam plantitaj arbidoj ofte estis forportitaj de vento. Sed la komunumanoj ne deprimiĝis. Kavoj estis plenigitaj de sablo, ili fosis denove; plantitaj arbidoj estis forportitaj de vento, ili plantis denove. Krome, ili pli atente flegis la arbidojn kaj fine akiris sukceson. Printrampe de 1968, ili forstumis tri kontraŭventajn kaj kontraŭsablajn arbarzonojn por bari moviĝon de la sablomontetoj al la nordo. Poste ili ebenigis 4 grandajn sablomontetojn kaj kulturebligis 300 muojn da tero apud la rivero per profunda plugo. En la lastaj jaroj, tiu brigado akiris riĉajn rikoltojn.

Post la ĝenerala starigo de komunumoj, en 1959 Prezidanto Maŭ montris: **“La fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo.”** Laŭ tiu instruo, la membroj de tiu komunumo disvolvis mekanikigan laboron de agrikulturo surbaze de kampa konstruado. Antaŭ starigo de la komunumo, ili havis nur 5 dizelojn kaj benzinajn motorojn kaj 270 noriojn movatajn per ĉevalo aŭ homo, la surkampaj laboroj estis plenumitaj preskaŭ tute per homa forto, tre pene kun malalta efiko. De post la starigo de la komunumo, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili aĉetis 1106 maŝinojn inkluzive de traktoroj, dizeloj, elektraj motoroj kaj pumpiloj per sia komuna akumilita mono, tiel ke 80% de la kampoj de tiu komunumo estas plugataj per maŝinoj kaj pli ol 90% de ĝiaj kampoj estas irigaciataj per pumpiloj. Kaj ankaŭ dank’ al plia sterkado kaj aliaj pliproduktaj rimedoj, ĝia produktokvanto de greno kaj legomoj akiris grandan kreskon. La produkta kvanto de greno en 1970 kreskis je pli ol 200% kaj tiu de





legomoj je pli ol 100% kompare kun tiu de 1957. La pomua produktokvanto de greno kaj legomoj en 1971 kreskis je pli ol 20% kompare kun tiuj de 1970. La komunumo kaj ĝiaj brigadoj ĉiuj havas rezervon de greno kaj la komuna kapitalo kreskas senĉese. Ankaŭ la efektivaj enspezoj de komunumanoj pliiĝis je 50% kompare kun tiuj antaŭ la komunumigo kaj ilia vivo ĉiam pliboniĝas. Antaŭ la Liberiĝo, la malriĉaj kamparanoj de tiu loko preskaŭ neniam manĝis rizon, sed hodiaŭ rizo fariĝis ilia ĉiutaga manĝaĵo. Antaŭe la amasoj trinkis

akvon el rivereto, sed nun la komunumo instalas al ĉiuj domoj akvokondukilon kaj krome elektrajn lampojn. Komunumanoj diris ĝoje: "Antaŭ la Liberiĝo malriĉuloj ne povis uzi lampon, sed post la Liberiĝo ni ekuzis olean lampon, dum la tempo de agrikultura kooperativo ni havis petrolan lampon kaj nun en la komunumo ni ĝuas elektran lampon. La vojo irata de ni fariĝas ĉiam pli luma. Pro ĉio ĉi tio ni dankas al la granda gvidanto Maŭ Zedong!"

*Sur draŝejo*

*Irigaciado per akvo de la Flava Rivero tra sifonaj tuboj.*



# Kondukanto en Ŝanĝo de la Postiĝinta Fizionomio de Ŝangjaŭ



*Kamarado Gaŭ Ĉangĉun*

**Ĉ**E la piedo de Tajhang-montaro, Ĝanghe-rivero kviete fluas orienten, akvumante kampojn sur ambaŭ bordoj. Sur la suda bordo de la rivero la deklivaj kampoj de Ŝangjaŭ-komunumo, Liĉeng-gubernio, Ŝanhi-provinco, kiuj suferis de sekco en longa tempo, nun estas irigaciata de akvo de Ĝanghe-rivero, kaj sur ĝi bone kreskas plantoj.

Vidante la kanalon serpentumantan inter montoj, la komunumanoj ekmemoris Gaŭ Ĉangĉun, la sekretarion de la partia komitato de la komunumo, kiu gvidis ilin en plenumado de tiu malfacila konstruado.

La 56-jara Gaŭ Ĉangĉun estas bona kadro, kiu revolucias kun plena vigeleco kaj senĉese faras novan kontribuon por la popolo. Lia faro estis laŭdata en la provinca kongreso de aktivuloj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Kaj la sub-provinca revolucia komitato de sudorienta Ŝanhi faris decidon, ke ĉiuj kadroj lernu de li.

Gaŭ Ĉangĉun devenis de malriĉa kamparana familio. Li laboris ĉe bienulo kiel tagdungito ekde sia 12-jara aĝo. Lia patro estis pafmortigita de japanaj agresantoj kaj lia patrino tre frue mortis de malsano pro manko de mono por kuraco. Kun forta klasa kaj nacia malamo li aktive sin jetis en la rezistan batalon kontraŭ la japana agreso. En 1942 li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Tiam li esprimis sian firman decidon al la Partio: "Mi por ĉiam sekvas la Komunistan Partion kaj Prezidanton Maŭ kaj batalos por liberiĝo de ĉiuj suferantaj popoloj. Kaj mi neniam forlasos la batalejon ĝis plena ekstermo de la kanibaloj en la mondo!"

En la pasintaj kelkdek jaroj, li neniam forgesis sian ĵuron. En la periodoj de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj Liberiga Milito li laboris kiel vilaĝestro, gvidante amasojn por batali kontraŭ




la japanaj kaj kuomintangaj malamikoj kaj bienu-  
loj kaj subteni la fronton. Pro sia elstara atingo  
li ĉeestis la Kongreson de Modeloj de la gubernio.  
Post la Liberiĝo li laboris kiel distriktestro kaj  
vicguberniestro, gvidante malriĉkampanojn, mal-  
superajn mezkampanojn kaj aliajn revoluciajn  
popolanojn por fari batalon kontraŭ la kontraŭ-  
revolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de la rene-  
gato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en tiu regiono por  
detrui agrikulturan kolektivigon, kaj firme iri sur  
la socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

En 1961, Gaŭ Ĉangĉun meminitate petis per-  
meson por transposteniĝi al Ŝangjaŭ-popolkomu-  
numo, kie laboro estis pli malfacila, kaj tie li laboris  
kiel sekretario de ĝia partia komitato.

Ŝangjaŭ estis loko longtempe suferanta de sekeco  
kaj postrestis ĝia produktado. Post fondiĝo de  
la popola komunumo multe grandiĝis la kolektiva  
forto kaj disvolviĝis ĝia agrikultura produktado.  
Sed la stato de dependo de la naturo en agrikul-  
turo estis ne radikale ŝanĝita. Alveninte tien Gaŭ  
Ĉangĉun ĉiuprintempe vektportis akvon por  
semado kune kun komunumanoj pro sekeco.  
Kien li iris, tie li interkonsiliĝis pri elimino de se-  
keco kun tieaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj  
mezkampanoj.

En 1964, Prezidanto Maŭ elmetis la grandan  
alvokon “**Ierni de Daĝaj en agrikulturo**”, kiu multe  
inspiris la komunumanojn de Ŝangjaŭ. En la  
sekvinta jaro, surbaze de enketo Gaŭ Ĉangĉun  
kune kun komunumanoj faris planon por konstrui  
sudan kanalon de Ĝanghe-rivero. Tiu ĉi kons-  
truado estis tre malfacila. Estis necese konstrui  
akvobaraĵon en la supra baseno de la rivero kaj  
kanalon longan je 32 kilometroj, kiu devas ĉirkaŭ-  
pasi cent montojn kaj transiri 87 ravinojn. Tie la  
montoj plejparte estas ŝtonozaj kaj preskaŭ duono  
de la konstrua laboro estis eksplodigi rokojn kaj  
sufiĉe granda parto de la kanalo devis trapasi  
krutajn rokmuojn.

Sed la malfaciloj ne povis ŝanceli la firman volon  
de Gaŭ Ĉangĉun kaj la komunumanoj. Ili deci-  
deme iris la vojon de Daĝaj kaj komencis la kons-  
truadon kun la batalvolo de Malsaĝa Avo por  
translokigi montojn. En februaro de 1966, Gaŭ  
Ĉangĉun, en la nomo de la partia komitato de la  
komunumo, faris en ĵurkunveno paroladon en



kiu li emfazis la gravan signifon de studo de verkoj  
de Prezidanto Maŭ. Sur la konstruejo li ĉie kura-  
ĝigis komunumanojn per la nobla spirito de Bet-  
hune, Ĝang Side kaj Malsaĝa Avo por venki mal-  
facilojn kaj ŝanĝi la fizionomion de la naturo.

Laŭ la plano oni devus konstrui kanalon lar-  
ĝan je 1.5 metroj, kun flukvanto de unu kubmetro

po sekundo por irigacii 800 hektarojn da agro de tiu komunumo. Tamen nelonge post la komenciĝo de la konstruo aperis du tute malsamaj opinioj: Iuj opiniis, ke oni devas larĝigi la kanalon ĝis 2 metroj por pliigi la flukvanton ĝis 1.5 kubmetroj po sekundo laŭ postulo de iu komunumo de najbara gubernio. Dank' al tio, post longigo la kanalo povos irigacii 1,800 hektarojn da agro de tiu gubernio en la malsupra baseno. Aliaj opiniis, ke oni devas konstrui kanalon kun larĝo de nur 1 metro por konduki flukvanton de 0.5 kubmetro po sekundo

kaj fini la laboron je la plej malfacila loko. Tiamaniere la kanalo povos irigacii nur 260 hektarojn da agro. Kiun opinion oni devis preni? Gaŭ Ĉangĉun do kune kun komunumanoj ripetade studis la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ. Post la studo kaj diskuto ili konsciis, ke farante la planon, ili nur zorgis pri si mem, sed ne pri la najbara gubernio kaj ili devas lerni la spiriton de **kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem**, kaj tiuj homoj kun la dua opinio havas konservativan penson kaj devas ĝin venki per ler-

*Studo pri nova projekto por reformi la naturon*






nado de la spirito de Malsaĝa Avo. Fine ili decidis larĝigi la kanalon de 1.5 ĝis 2 metroj.

En konstruado de la kanalo sin trovis 12 malfacilaj lokoj, el kiuj la plej malfacilaj kaj danĝeraj estis la montoj Huangjanŝan kaj Gaŭjaŝan. Tie troviĝis kruta rokmuro kun longeco de pli ol 1,600 metroj, ĝia plej alta loko atingis 280 metrojn kaj en iuj lokoj rokoj ĉe la supro sin etendas el la muro. La kanalo devis trapasi la rokmuran talion, tial la konstruo estis tre malfacila. Kiam oni diskutis la aferon, komunumano Li Venjaŭ sin anoncis por ke oni ligu lin ĉe la talio kaj malsuprenigi lin por bori rokojn por eksplodigo. Oni demandis lin: "Ĉu vi kun tia granda aĝo kuraĝas malsupreniri rokmuron kun alteco de 200-300 metroj?" Li respondis: "En la malnova socio, por vivteno mi malsupreniris rokmuron por kolekti drogherbojn spite al vivdanĝero, nun mi iros tien por la kolektivo kaj socialismo. Se mi mortos pro tio, mia morto estos inda." La revolucia spirito de Li Venjaŭ disvastiĝis tra la konstruejo kaj pli ol 200 homoj sin anoncis por plenumi tiun laboron. Fine oni elektis 10 homojn, kiujn oni ligis ĉe la talio per ŝnurego, por ke ili laboru kun longa hoko pendante ĉe la talio de la rokmuro.

En la konstruado Gaŭ Ĉangĉun estis kaj komandanto kaj ordinara laborulo. Li manĝis kaj laboris kune kun la amasoj kaj aperis tie kie estis malfaciloj. Mankis teknikistoj por trovi konvenan kanalan linion. Gaŭ Ĉangĉun persone faris detalan esploron kun kelkaj homoj sub sia gvido, per memfaritaj mezuriloj kaj grimpante rokmuron, kaj akiris kompletan fidindan materialon. Tre peniga estis la laboro vintre elakvigi sablon el la rivero dum konstruado de la akvobaraĝo. Sed li senhezite laboris kune kun komunumanoj starante en la frosta rivero. La lastaj admonis lin zorgi la sanon, sed li diris: "Vi ne rigardu min kiel maljunulon, sed rigore traktu min kiel komuniston. Komunisto edukita de Prezidanto Maŭ



*La akvo de Ĝanghe-rivero estas kondukata sur monton.*

ja devas penadi, doni bonan ekzemplon kaj senĉese antaŭenmarŝi."

Sub la gvido de Gaŭ Ĉangĉun la popolamasoj de Ŝangjaŭ venkis multajn malfacilojn per revolucia spirito de malegoismo kaj sentimeco en pena batalo de 5-6 jaroj kaj ebligis al la konstruado sukcesan iradon. Nun ili jam finkonstruis kanalon kun longeco de 26 kilometroj, traboris 25 tunelojn kaj konstruis 19 surpontajn akveduktojn, per kio ili plenumis 86% de la tuta konstrua laboro. El tio 60% de la tero de la komunumo jam akiris profiton kaj komencis grandmezure pliprodukti. Kiam oni ĝoje jubilis pro la sukceso, Gaŭ Ĉangĉun diris: "Tio estas nur la unua venko. Nin atendas la malfacila tasko plue ŝanĝi postiĝintan fizionomion de Ŝangjaŭ. Ni devas daŭre klopodi."

# Vizito al Anfeng-lago

**E**N la gubernio Ŝou de la provinco Anhuj estas la lago Anfeng, granda antikva irigacia konstruaĵo kun historio de pli ol 2,000 jaroj.

La lago havas areon de ĉ. 40 kvadrataj kilometroj. Ĝia supra parto ligiĝas kun akvokonservejoj en Dabie-montaro kaj ĝia akvo fluas en Huaj-riveron tra Vabu-lago. La regiono irigaciata de la lago estas ĉarma, la grundo apud ĝi estas grasa kaj tie abundas produktaĵoj. Antaŭ nelonge ni vizitis la irigacian regionon de Anfeng.

Anfeng-lago havas longan historion, tamen sub la regado de kuomintang-aj reakciuloj, la tiea popolo vivis en mizero. En koluzio kun bienuloj kaj akvomopolantoj, kaj sub preteksto de reordigo de la lago, la reakcia registaro kruele ekspluatis la popolon elpremante diversajn impostojn. Kadukiĝis la digo pro longa neriparo, malprofundiĝis la lago pro sedimentiĝo, sekiĝis fontoj kaj jaron post jaro reduktiĝis la akvorezervo, per kiu oni povis irigacii nur pli ol 4,000 hektarojn da kampoj kaj el tiuj kampoj 85% estis irigaciataj per levado de akvo. Tiam la lago povis servi nur al riĉuloj kaj potenculoj, kvankam la malriĉaj kamparanoj ĉe la lago povis uzi iometon da akvo, tamen ilia rikoltaĵo estis preskaŭ tute forrabita de la bienuloj kaj akvomopolantoj sub preteksto de farmpagoj kaj akvo-impostoj, tiel ke multaj kamparanoj longe vivis tragike sen manĝo kaj vesto.

La hodiaŭa Anfeng-lago jam fariĝis riĉa loko. Kiam ni vizitis tie, respondeculo de la revolucia komitato de la Administracio de Irigacia Konstruado rakontis al ni pri la ŝanĝiĝo sur la digo de la lago.

Post la Liberiĝo, la Partio kaj registaro faris la alvokon "reordigi Anfeng-lagon kaj konstrui riĉan hejmlokon", donis ekipaĵojn kun valoro de pli ol 10 milionoj da juanoj, sendis multajn teknikistojn kaj pretigis cent mil laborulojn por dragi

ŝlimon, konstrui digojn kaj kluzojn, ripari kanalojn, kunigi fluojn kaj ŝtopi breĉojn. Sub la direkto de la ĝenerala linio de socialisma konstruado, la vastaj amasoj de la laboruloj larĝigis la digon kun longo de 60 kilometroj de 1 metro ĝis 8 metroj kaj altigis ĝin de 27.5 metroj ĝis 31.5 metroj per diligenta laboro. Samtempe ili fosis ĉe la supra parto ĉefkanalon kun larĝo de 50 metroj, profundo de 17 metroj kaj longo de 70 kilometroj. La kanalo ligiĝis kun la ĉefkanalo liganta la tri riverojn Pejhe, Ŝihe kaj Hangbu, tiel ke kunfluis la akvofontoj el Dabie-montaro. De tiam la lago tutjare estas plena je akvo de pli ol 64,600,000 kubmetroj. La irigaciado de 83,300 hektaroj da agroj de la 32 popolaj komunumoj ĉe la lago estis garantiata. La irigaciata areo dudekunuobligis kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. La respondeculo de la revolucia komitato diris al ni: "Post la Liberiĝo, la Partio kaj ŝtato ĉiurimede klopodis por efektiviĝi memfluan irigacion por redukti ŝarĝon de la komunumoj je laborintenseco, materialo kaj mono. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la ŝtato konstruis ĉe la lago unu grandan kluzon, sep reguligajn kluzojn, unu akvoellasan kluzon kaj unu sifonan stacion. La komunumoj fosis ĉirkaŭ la lago 5 larĝajn kanalojn kun totala longo de preskaŭ 200 kilometroj kaj pli ol 5,000 kanaletojn kun totala longo de pli ol 10,000 kilometroj. Sur tiuj kanaloj kaj kanaletoj oni konstruis kelkdek mil kluzetojn kaj aliajn konstruaĵojn, per kiuj ili efektiviĝis memfluan irigacion. La grenprodukto de la irigaciata regiono disvolviĝis jaron post jaro kaj la kvanto estas pli ol kvinoblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. Parolante pri tio ni atingis iun grandan reguligan kluzon kun alteco de trietaĝa domo, kie junulo estis turnanta radon. Malfermiĝis kluzpordoj kaj akvo torentis el la pordo en kanalon. Kamarado kiu akompanis nin diris al ni: "En la pasinteco, 100 fortaj viroj laboris 10 diurnojn per tuta forto, tamen nur povis irigacii malpli ol 7 hektarojn da





*Fiŝkaptado*

altaj kampoj. Nun, la kluzo altigis la akvoni-velon, tiel ke en 7 diurnoj dek mil hektaroj povas esti irigaciataj. Tamen tio bezonis nur kelkajn homojn por prizorgi la fluadon kaj kluzopordojn!”

En tagmezo ni vizitis Anfeng-fiŝbredejon. Kamarado Lju, estro de la revolucia komitato de la fiŝbredejo, kondukis nin al alvusa baseno. Montrante la alvuson li diris al ni: “Kun disvolviĝo de irigacia konstruado, la komunumanoj ĉe Anfeng-lago aktive disvolvas fiŝbredadon plene utiligante la akvejojn donante sufiĉan atenton al grena

produkto. En 1957 la ŝtato fondis ĉi tie Anfeng-fiŝbredejon kun pli ol cent laborantoj.” En tiu tago ni rigardis aktivadon de ĝiaj fiŝkaptistoj.

Pasinte alvuso bezonata de Anfeng-lago estis portita de Jangzi-rivero. En 1958, sub la helpo de la Ĉina Scienca Akademio, laborantoj de Anfeng-lago faris artan fekundigon, tiel ke fiŝoj de Jangzi-rivero naskis idarojn en Anfeng-lago. De la fondiĝo ĝis nun, la fiŝbredejo produktis pli ol dek milionojn da fiŝidoj de diversaj specoj por provizi sin mem kaj la proksimajn komunumanojn. La



lago ĉiujare liveras ĉ. 500 tunojn da fiŝoj al merkato en kaj ekster la lando.

Ni forlasis la fiŝbredejon kaj venis al Gedian-komunumo apud Anfeng-lago. Tie ni vidis ke ondas smeraldaj rizkampoj en vento, murmuris interkruciĝantaj kanaletoj kaj novaj domoj de komunumanoj staris inter poploj kaj salikoj. Respondeculo de la komunumo diris al ni: "Kun pli profunda disvolviĝo de la amasa movado de lerno de Daĝaj, la vastaj amasoj de komunumanoj levis altan tajdon de irigacia konstruado. Nun 4,900 hektaroj da kampoj de tiu ĉi komunumo estas memflue irigaciataj per akvo de la lago. La grena produktokvanto pli kaj pli grandiĝas. En 1970, kvankam la komunumo trafis seriozajn katastrofojn de ventego, hajlo kaj insekto, tamen la meznombra produktokvanto estas duoblo de tiu antaŭ la granda kultura revolucio. La pohektara produktokvanto

de nemalmultaj produktaj brigadoj kaj grupoj superis 6 tunojn. En 1970, la komunumo liveris al la ŝtato 2,800 tunojn da greno. Nun en la komunumo ĉiuj produktaj grupoj kaj ĉiuj familioj havas rezervan grenon, ĉiuj vilaĝoj bredas multajn porkojn kaj instalas megafonojn. La komunumo havas 19 mezajn kaj elementajn lernejojn, tial preskaŭ ĉiuj geknaboj vizitas lernejon. La komunumo nove konstruis du hospitalojn kompare bone ekipitajn, ĉiu brigado starigis sanitarojn kaj ĉiu produkta grupo havas sanitariston. La vivo de la komunumanoj pli kaj pli boniĝas.

Ni vizitis la hejmon de kamarado Giang Hongkaj. Lia familio okupas 6 vastajn ĉambrojn laŭbezone meblitajn. Sur tablo estas transistora radioricevilo kaj la litojn kovras kulvualoj. Kamarado Giang varme akceptis nin. Li emocie rakontis al ni:

"En la malnova socio la kvar homoj de mia familio almozis aŭ laboris kiel dungitoj aliloke. Post la Liberiĝo, dank' al la kora zorgo de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, mi starigis mian feliĉan familion. Nun el miaj 11 familianoj 3 vizitas lernejojn, 4 laboras en la produkta grupo kaj 1 laboras en fabriko de Hefej (ĉefurbo de Anhuj-provinco). En 1970, 4 el la familianoj respektive ĉeestis gubernian kaj subprovincan kunvenojn de reprezentantoj de aktivuloj en studo de Maŭzedongpenso. ... Arbo havas radikon kaj fluo havas fonton. Dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, ni laborantaj popolamasoj apud Anfeng-lago akiris la hodiaŭan feliĉon."

Vespere kiam ni surpaŝis la grandan digon de la lago, ni vidis pejzaĝon pli imponan. Sub brilo de la vesperruĝo, la lago respegulas buntajn radiojn kaj la akvo kvazaŭ kunfandiĝas kun la ĉielo.



*Giang Giajun, infanĉino en la malnova socio, nun estas vicestro de la provinca revolucia komitato. Jen ŝi laboras kune kun komunumanoj ĉe la lago.*



# La Irigacia Sistema de Ŝaŭŝan


Fotoj de la Hunan-a Tagjurnalo

La irigacia sistemo de Ŝaŭŝan troviĝas en la monteta regiono de Ŝaŭŝan, Hunan-provinco.

La sukcesa konstruiĝo de la irigacia sistemo en la regiono efektivigis memfluan irigacion al miliono da muoj da kampoj, reduktis stagnoinundajn katastrofojn al pli ol 30,000 muoj da kampoj, plivastigis la plantareon de durikoltaj rizoj, pligrandigis la totalan produktokvanton de greno je pli ol unu oblo kompare kun tiu antaŭ ĝia konstruiĝo kaj krome akcelis disvolvon de la industria kaj agrikultura produktado per navigo, akvoprodukto, prilaboro de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj produkto de elektroenergio.

La akvokonduka barajo de la irigacia sistemo de Ŝaŭŝan, laŭ kiu akvo de Lianŝuj-rivero estas kondukata en la montetajn regionojn de Hianghiang, Hiangtan, Ŝaŭŝan, Ninghiang k. a.






La bela akvedukto super Lianŝuj-rivero taŭgas ankaŭ por navigo.

Dank' al irigaciado, nemalmultaj kalvaj montoj kaj virgaj terpecoj fariĝis grenkampoj. Jen nova te-kulturejo de Ŝaŭŝan-komunumo.







Riĉa rikolto ĉie en la regiono





La trunka kaj branĉaj irigaciaj kanaloj  
interligas la irigaciajn areojojn apud la  
por akvumaj areoj kampoj.





# La Nuna Cajdam

*Gobio etendiĝas ĝis la horizonto;  
Kroĉiĝas nuboj al la altaj Kunlun-montoj.  
Fabrikoj kaj minejoj jen-kaj-jen-e kuŝas;  
Drilturoj malproksimaj la ĉielon tuŝas.  
Al nia stepo Prezidanto Maŭ feliĉojn sendas;  
Kvazaŭ pentraĵo nun Cajdam tre bele sin  
prezentas.*

Tiel laŭdas la loka diversnacieca popolo pri la atingoj en la konstruado de Cajdam.

Cajdam situas sur Kinghaj-altebenejo en okcidenta Ĉinio. Antaŭe oni priskribis ĝin kiel "vastan senhoman basenon". Sed hodiaŭ tute aliiĝis ĝia aspekto. Ĉe la piedo de neĝkovritaj montoj Kunlun staras drilturoj en vicoj. Tie kaj ĉi tie estas minejoj kaj fabrikoj. Kaj aperis ankaŭ novaj loĝpunktoj kaj urboj. Sur nove konstruitaj ŝoseoj kuras kamionoj anstataŭ kameloj konataj kiel ŝipoj sur sabla maro por porti al aliaj lokoj de la patrolando la produktaĵojn: petrolon, asbeston, plumbon, zinkon, potasosterkon kaj aliajn krudajn materialojn por kemia industrio.


Cajdam estas unu el niaj tri grandaj basenoj. Ĝi havas areon de pli ol tricent miloj da kvadrataj kilometroj kaj estas brakumita norde kaj sude de la du montĉenoj Kunlun kaj Kilian. La loko estas riĉa je mineralaj riĉfontoj kaj tre maldense loĝata.

En 1949, kiam la Popola Liberiga Armeo starigis ruĝan flagon en la baseno, troviĝis nur malmultaj agrikulturaj punktoj kaj vivis nomade nur paŝtistoj mongolaj, tibetaj kaj kazahaj en ĝia orienta parto, kie troviĝis akvo kaj herboj, kaj en la cetera parto estis dezertejo, vasta kiel maro. De 1950, la registaro sendis geologiajn laborantojn

al la orienta parto por esplori la lokon. Dum la granda antaŭensalto de 1958, sub la direktado de la ĝenerala linio elmetita de Prezidanto Maŭ "Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie", grandnombraj konstruantoj venis ĉi tien de diversaj lokoj de nia lando kaj levis altan tajdon de konstruado en Cajdam. Oni ekspluatis minejojn kaj konstruis fabrikojn, venkinte la malfavorajn naturajn kondiĉojn de alta situacio super la marnivelo, grandan venton kun sablo, mankon de akvo, malfacilecon de trafiko kaj tiel plu.

Multaj el la minekspluataj kaj industriaj entreprenoj en Cajdam komenciĝis kun tendo, kelkaj kameloj kaj malmultaj simplaj instrumentoj, kaj iom post iom disvolviĝis ĝis la nuna skalo. Ekzemple, en la fino de 1957, kiam la laboristoj kaj kadroj de la Minejo de Plumbo kaj Zinko sur Hitie-monto venis por ekspluati la minejon, ili havas supre la ĉielon kiel tegmenton kaj sube la montojn kiel plankon. Oni instalas sur montoj tendojn kaj kaldronojn, kiujn ili kunportis, kaj eklaboris. En pli ol dek jaroj, la minejo jam elfosis ercon kun totala pezo de centmiloj da tunoj. Samtempe ĝi jam fariĝis duonmekanikigita.

Alia ekzemplo estas la potasosterka fabriko en Ĉaerhan, kiun revoluciaj amasoj starigis ĉe la salakva lago ankaŭ per mizeraj rimedoj en 1958. Tiam kvar kadroj venis kun 15 laboristoj al la vastega lago. Ili sin kunpremis en sola tendo kuŝante sur frosta kaj malmola tero por tranokti. Por ricevi dolĉan akvon ili devis iri al rivero 30 kilometrojn fora. En vintro kiam glaciigis la rivero, oni



*Petrolrafinejo konstruita en 75 tagoj*

reportis glacion por ricevi akvon. Ĝuste tiel ili komencis produktadon.

La konstruado de Cajdam-baseno ricevis grandan prizorgon de la Partio kaj registaro. La registaro plurfoje sendis prospektoran trupon al ĝi, kio multe fervorigis tiean diversnaciecan popolon en konstruado. Ili meminciate helpis la prospektoran trupon en gvidado, interpretado, informado, transportado, serĉado kaj raportado de minpunktoj. Antaŭ la Liberiĝo sub la reacia regado de Kuomintangoj ujugura maljunulo Jiŝa Agi fuĝis al Cajdam kun sia edzino kaj filino el Hingiang pro manko de vivrimedo. Li migris en la vasta dezertejo pli ol 30 jarojn. En diversaj okazoj, por trovi brulaĵon

kaj nutraĵon li trovis bitumon kaj la salakvan lagon. Dum paŝtado li trovis diversajn ercojn. Sed, pelate de frosto kaj malsato, li ne povis pli longe resti kaj revenis al Hingiang. Post la Liberiĝo li informiĝis ke Prezidanto Maŭ sendis prospektoran trupon al Cajdam por ekspluati tieajn naturriĉaĵojn. La maljunulo jam ĉirkaŭ 60-jara speciale venis al la loko por gvidi la trupon. Dank' al lia helpo, la trupo trovis vojliniojn, akvojn, kultureblajn grundojn kaj oleminojn. Sub la komuna klopodo, la diversnaciecaj popolanoj kaj prospektoroj kune trovis multajn specojn de ercoj kaj grandnombrajn minpunktojn por disvolvi la industrian konstruadon en la baseno.



Por enporti grandnombrajn materialojn, ekipaĵojn kaj personaron en la basenon, la registaro sendis multe da vojkonstruaj laboristoj por konstrui Kinghaj-Tibetan kaj Kinghaj-Hingiangan ŝoseojn, kiuj trairas la basenon. En kvar jaroj estis konstruitaj proksimume du mil kilometroj da ŝoseo. Dume venis de diversaj lokoj laboristoj por kune kun la lokaj loĝantoj fari socialisman konstruadon. En 1970, kiam la Mongola, Tibeta kaj Ujgura Aŭtonoma Distrikto de Hajhi decidis fondi la unuan sukerrafinejon de la baseno, la koncerna gvidinstanco provizis ĝin per ĉefa ekipaĵo kaj komisiis la Sukerrafinejon de Vuvej por helpi ĝin teknike. La lasta sendis kvalifikitajn laboristojn al la nova fabriko, kiuj pacience kaj detale instruis al la nacimalplimultaj laboristoj la teknikojn de instalo de ekipaĵoj kaj produktajn metodojn, tiel ke la nova fabriko ekfunkciis en marto de 1971.

La gubernioj, urbetoj kaj popolaj komunumoj de la nomita distrikto cetere fondis diversajn fabrikojn kaj minejojn en siaj lokoj, subordigitajn en la unueca planado de la ŝtato, utiligante la loke troveblajn materialojn. Nun, en tiu distrikto, funkcias malgrandaj karbominejoj, kuprominejoj, ferminejoj, elektraj stacioj, cementaj fabrikoj, kemisterkaj fabrikoj, fabrikoj de agrikulturaj kaj paŝtistaj instrumentoj, prilaborejoj de brutaj produktoj kaj tiel plu en nombro de centoj. La totala produktovaloro de tiuj entreprenoj en 1970 kreskis pli ol 100% kompare kun tiu en la jaro 1964, antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio.

La disvolvo de la loka industrio stimulas la produktadon de agrikulturo kaj brutobredado, subtenas la konstruadon de granda industrio, liveras al la ŝtato varojn por eksporto kaj provizas la popolon per ĉiutagaj bezonaĵoj.

Dum ekspluatado kaj konstruado de Cajdam aperis granda nombro da heroaj komunistoj kaj progresemluloj, kiuj ne timas malfacilojn kaj penadon pro la revolucia afero, antaŭenpuŝante la konstruadon kune kun la vastaj amasoj en la brava luktado por meti bazon de industriigo de la loko.

La kompartiano Jan Kingjong de la Kinghaja Petrola Administracio forlasis sian hejmlokon Dunhuang kaj venis de Gansu-provinco al Cajdam por trovi petrolon tie, kiel membro de la unua geologia esplorotrupo. En tiu tempo la tuta okcidenta parto de la baseno estis dezerto, kie troviĝis nenio alia krom altaj montoj kaj vastaj etendaĵoj kovritaj per sablo kaj saleca grundo. Foje, li



*La dua subplotono de la tria roto de la Kinghaj-a Petrola Buroo ĉiumonate superplenumas sian taskon.*


*Inĝeniero Ŝen Ĝičen (la maldekstra) studas pri la kvalito de nova borilo kune kun laboristoj.*



estas komisiita konduki dek kamelojn plene ŝarĝitajn per materialo kaj instrumentoj por esploraj laboroj al iu laborpunkto ĉe piedo de Kunlun-montoj pli ol 300 kilometrojn fora de la bazloko. Li havis nur simplan geografian skizon por gvidi sin al la celloko tra la fremda vastejo. La vetero en la dezertejo estis variema. Dum tagmezo la sablo brulis al la piedoj, sed en iu momento subite blovegis forta vento, kiu levis sablon kaj rulis ŝtonetojn, tiel ke mallumeco vualis la lokon kaj la ĉielo kaj tero ne estis plu distingeblaj. Tamen, la malfaciloj ne povis ŝanceli la firman decidemon de Jan King-

jong plenumi sian taskon pro la morgaŭo de Cajdam. Kaj li persiste antaŭeniris venkante diversajn malhelpojn kaj fine atingis la cellokon kun la dek plenŝarĝitaj kameloj post 11 tagoj plenaj de penado.

En pli ol dek jaroj Jan Kingjong kaj aliaj prospektoroj trairis la basenon. Kaj nun kiel sekretario de la partia filio de la trupo li ĉiam kun la sama revolucia spirito kiel antaŭe batalis sub la libera ĉielo kune kun la trupanoj por trovi pli da petrolaj fontoj por la patrolando. Li fiere diris: "Por konstruado de la baseno mi pretas dediĉi la tutan vivon en mia laboro."



*Alia nova puto sur alta monto komencis mem elŝpruci petrolon.*



# Naskiĝo de Nova Teknologio

*Maŝinfabrikaj laboristoj lerte kaj tre saĝe  
Du etajn ilmaŝinojn faris kun supera arto.  
Ĉi tiuj kvazaŭ du formikoj rodas avantaĝe  
En fabrikado de giganta konvertora parto.*

Tio estas kanto de ŝanhajaj laboristoj en la granda antaŭensalto de 1958, pri la kortuŝa faro de laboristoj de la Ŝanhaja Gianŝe-a Maŝinfabrika, kiuj energie faris teknikan renovigon sin apogante sur propraj fortoj kaj kuraĝis pensi kaj agi.

Depost tio jam forpasis 13 jaroj. Nun oni povas vidi ĝoje ke la laboristoj de tiu maŝinfabrika senhalte disvolvis la revolucian spiriton de penema luktado kontraŭ malfaciloj, tiel ke la malgrandaj maŝinoj nomataj kiel formikoj rapide evoluis kaj fariĝis pli kapablaj. Hodiaŭ, la prilabora metodo “ĉirkaŭrodado de formikoj” jam fariĝis grava kreo de teknologio en la maŝinfabrika industrio de nia lando.

La Ŝanhaja Gianŝe-a Maŝinfabrika, kiu kreis tiun ĉi teknologion, estis malgranda fabriko kuniĝita el 6 forĝejoj kaj riparejoj en la jaro 1956. Tiam ĝi havis nur pli ol 200 homojn kaj plejparto de la ekipaĵoj estis torniloj uzitaj dekojn da jaroj, kiuj taŭgis nur por riparado. En la granda antaŭensalto de 1958, kondukate de la ĝenerala linio elmetita de Prezidanto Maŭ “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”, la laboristoj de tiu fabriko elvolvis plenan revolucian energion kaj decidis fari novan kontribuon al la socialisma konstruado.

Tiam iu ŝtala fabriko de Ŝanhajo urĝe bezonis du blovajn skatolojn — grandajn pecojn por konvertoro. La skatolo havis longon de 4.6 metroj, larĝon de 3.6 metroj kaj pezon de 11 tunoj. Se oni prilaborus ĝin per kutima metodo, oni bezonus 32-tunan alezmaŝinon kaj 70-tunan grandan dufostan rabotmaŝinon. Por aĉeti unu tian maŝinon oni devas elspezi 600,000 juanojn kaj atendi 2-3 jarojn de mendo ĝis muntado kaj ekprodukto. Tio ne konformas al la postulo de la ĝenerala linio de la socialisma konstruado. Aŭdinte la aferon, la laboristoj de la maŝinfabrika iniciative prenis sur sin la taskon. Certe premdetruigus eĉ la plej granda maŝino de la fabriko, se oni metus sur ĝin la grandan prilaborotan maŝinpecon, por ne paroli pri prilaborado. Sed la laboristoj ne estis timigitaj de la malfaciloj. Ili metis la maŝinon sur la prilaborotan pecon kaj fabrikis dutranĉilan ilmaŝinon, kiu povas raboti kaj alezi samtempe. Tiamaniere ili venke plenumis la taskon en 18 tagoj. Post tio la laboristoj intime nomis la maŝinon, kiun ili mem fabrikis, “formiko” kaj la metodon de prilaboro de granda maŝinpeco per malgranda ilmaŝino “ĉirkaŭrodado de formikoj”.

La sukceso en prilaboro de blovaj skatoloj per malgrandaj maŝinoj donis al la laboristoj grandan kuraĝigon kaj inspiron. Sed, same kiel aliaj novaĵoj, ankaŭ tio suferis atakon de agentoj de renegato Liu Ŝaŭki en Ŝanhajo kaj iuj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”. Ili galimatis, ke tia metodo estas “nescienca”, ke “formikaj ilmaŝinoj estas malmodernaj kaj malnormalaj”, kun la intenco malhelpi produktadon per tiu nova teknolo-

gio. La laboristoj decidis rebati tiujn atakojn kaj subfosojn per nova sukceso. En prilaborado de diversaj maŝinpecoj ili senĉese plibonigis ekipaĵojn kaj grandigis ilian efikecon. Ili fabrikis por la ŝtato 6.6-metran diskan ingotigan maŝinon, 1,500-tunan hidraŭlikan premmaŝinon, gas-valvon — la ŝlosilan parton de ekipaĵo por trajnaj radringoj— kaj minejajn dispecigajn maŝinojn k. a. gravajn maŝinojn.

La maŝinfabriko senĉese disvolviĝas en batalo kaj iliaj simplaj ekipaĵoj estis plibonigitaj kaj kompletigitaj paŝon post paŝo. La unuope funkciaj malgrandaj maŝinoj disvolviĝis en kompletan kaj formis laborlinion kiu povas fari unuigitan prilaboron al normalaj produktaĵoj. Por altigi laborefikon, la laboristoj disvolvis la malgrandajn maŝinojn kun sola kapablo en duonaŭtomatan kun pluraj kapabloj, pluraj tranĉiloj kaj rapidecoj. Laŭ la bezono de prilaboro de specialaj pecoj, ili fabrikis pli ol 20 specojn de specialaj malgrandaj ilmaŝinoj, el kiuj iuj povas tranĉi prilaboratan objekton demalsupre; iuj povas prilabori interne en la objekto; iuj povas samtempe bori


8-16 truojn; iuj povas alezi 5-metran cilindron; iuj povas bori malgrandan kaj longan truon; iuj povas prilabori objekton ĉirkaŭirante. Tiuj malgrandaj maŝinoj povas solvi problemojn nesolveblajn por gigantaj maŝinoj kaj garantiis la venkan plenumon de diversaj taskoj. Kun la sukcesa elfabriko de grandnombraj malgrandaj maŝinoj, la laboristoj kreis serion da specialaj prilaboraj metodoj. Kvankam la objektoj prilaborataj de ili estas pli kaj pli grandaj kaj pezaj, de 10 tunoj ĝis preskaŭ 100 tunoj, tamen la malgrandaj maŝinoj uzataj de ili estas pli kaj pli malpezaj kaj facile manipuleblaj. Iuj povas esti apartigitaj aŭ kunmetitaj, kiel infanaj konstruaj modeloj.

Iufoje, la fabriko akceptis urĝan taskon, kiu postulis la fabrikon prilabori en tri monatoj supran kaj malsupran framojn de granda 11-cilindra rektiga maŝino por prepari ŝipajn ŝtalplatojn. La maŝinkorpo en la formo de elefanto pezis 40 tunojn. Oni devis bori 42 truojn kun malsamaj diametroj kaj raboti dekojn da facoj. La prilaborado estis tre komplika. La grupo de stablolaristoj kiu prenis sur sin la taskon, renversis la maŝinkorpon.

*Maljuna laboristo Ĝang Ŝiking de la Ŝanhaja Gianŝe-a Maŝinfabriko klarigas prilaboran metodon de "rodado de formikoj".*







*Por prilabori gigantan ŝtalan platon kun larĝo de 3 metroj, longo de 8 metroj kaj pezo de 30 tunoj, maljuna laboristo Ĵen Jueking (maldekstre) kaj aliaj laboristoj de la Ŝanhaja Ĝianŝe-a Maŝinfabriko kreis la ilmaŝinon "suprenroda formiko".*

Per 5 malgrandaj maŝinoj laboristoj samtempe komencis prilaboradon sur kaj sub, ekster kaj en ĝi. La tasko estis bone plenumita nur en iom pli ol du monatoj.

Antaŭe la maŝinfabriko ne havis specialajn teknikistojn; nun, dank' al praktiko en projektado kaj fabrikado de tiuj malgrandaj maŝinoj, jam elkreskis propra teknikistaro de laborista klaso, kiu senĉese elvolvas sian rolon en amasa teknika renovigo. Lastatempe la fabriko prenis sur sin iun taskon, en kiu iu prilaborota maŝinpeco havis la pezon de 80 tunoj. La fabriko ne havis ekipaĵojn por prilabori tiel grandan objekton. Laboristoinĝeniero Ĝeng Ŝunfu sorbis la superecojn de diversaj malgrandaj maŝinoj kaj ankaŭ tiujn de fremdlandaj alezmaŝinoj kaj fabrikis vertikalstangan alezmaŝinon subtenate de gvidantoj kaj laboristoj.

Ĝi havas nur alezan stangon sed ne korpon. Komence ĝi prenis grandan platon kiel korpon por prilabori la framon. Kiam la centra truo estis borita, la stango estis instalita en la truo, prenis la framon kiel sian korpon kaj komencis prilabori aliajn lokojn de la framo. Per tiu metodo, la alezmaŝino kun pezo de malpli ol 4 tunoj prilaboris objekton dekojn da obloj pli pezan ol ĝi.

La revolucia praktiko de laboristoj de la maŝinfabriko pruvis, ke "ĉirkaŭrodado de formikoj" ne nur povas prilabori objektojn neprilaboreblajn por iuj grandaj maŝinoj, sed ankaŭ ŝpari al la ŝtato multe da investo, rapidigi prilaboradon kaj bonigi la laborkvaliton, per kiuj la laboristoj faris kontribuon por disvolvi la maŝinfabrikan industrion de nia lando multe, rapide, bone kaj ekonomie.



# Interligita Transportado de Guangdong-provinco

*Intensa laboro de interligita transportado ĉe la Suda Stacio de Kantona Fervoja Buroo*

GAŬ FANG

**G**UANGDONG estas provinco en la suda Ĉinio, tra kiu iras importaj kaj eksportaj komercaĵoj. La Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj okazas dufoje ĉiujare en ĝia ĉefurbo Kantono. Kun la senĉesa disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado kaj la eksterlanda komerco, ĉiam pli peziĝas la tasko de transporto de tiu provinco. Laŭ la postulo de tiu nova situacio, la transporta sekcio de Guangdong disvolvis interligitan transportadon de fervojoj, navigaj vojoj kaj ŝoseoj, kio altigis la laborefikon de transporto, efike subtenas la industrian kaj agrikulturan produktadon kaj faciligis la vivon de la popolamasoj.

## GRAVA REFORMO EN TRANSPORTO

En la sistemo de interligita transportado, kunordiĝas ĉiuspecaj transportaj fortoj, strikte interligiĝas fervojoj, ŝoseoj kaj navigaj vojoj, la ŝtataj kaj popolaj transportaj unuoj obeas unuecan direktadon kaj la transportaj kaj diversaj fakoj

de la nacia ekonomio strikte kunlaboras. Tio estas grava reformo sur la transporta fronto, kiu manifestas la avantaĝon de la socialisma sistemo.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, pro tio ke Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la transporta sekcio antaŭenpuŝis kontraŭrevolucionan reviziisman linion, pledis por “profito en komando” kaj “detala labordivido”, la organika tuto de socialisma transporto estis intence dividita, tiel ke la diversaj transportaj sekcioj apartiĝis unu de alia kaj formiĝis tre komplika sistemo. En tiu tempo, la varoj de diversaj lokoj de la provinco transportitaj al Kantono tra navigaj vojoj kaj ŝoseoj kaj plue transportendaj per fervojo devis esti portitaj de la komisiinto al la fervoja stacio kaj denova komisia procedo devis esti plenumita. Tia aranĝo malŝparis kaj homfortojn kaj materialon. Post la efektiviĝo de interligita transportado, la varoj alportitaj tra navigaj vojoj en la provinco al Kantono povas esti rekte senditaj al la fervoja stacio por plua transporto. Dank’ al tio, la transporta kosto de ĉiu tuno da varo malaltiĝis je 7 juanoj



kaj en ĉiu jaro oni povas ŝpari pli ol 500,000 juanojn por la ŝtato. Kaj krome mallongiĝis la atendado de la varoj en vartenejoj.

Dum disvolvado de la interligita transportado, la transporta sekcio de Guangdong-provinco senĉese reformis malnovajn regularojn, simpligis la procedon de transporto kaj plibonigis la administran laborstilon.

En la pasinteco, tre komplika estis la komisiado de transporto, ke la komisianta unuo devis iri al banko kaj stacio por plenumi la komplikan procedon kaj se la varoj devis esti transportataj per survoja ŝanĝo de transportiloj, ĝi devis sendi homon al la koncernaj lokoj por plenumi koncernan komisiitan procedon. Tial, la unuoj kiuj ofte komisiis transportadon de varoj devis starigi transsendajn staciojn kaj oficejojn en diversaj lokoj, kio kaŭzis malŝparon de homfortoj, materialo kaj tempo. Post starigo de la sistemo de interligita transportado, la transporta sekcio komencis zorgi ankaŭ pri depreno de varoj, survoja ŝanĝo de transportiloj kaj portado de varoj al la komisiantoj kaj efektivigis ĝisfinan respondecadon pri varoj dum la tuta vojo en transportado. Por komisiita transportadon nun sufiĉas unufoja aranĝo.

La disvolvo de interligita transportado ankaŭ akcelis la reformon de distribuado de produktaĵoj. En la pasinteco, la produktaĵoj de fabrikoj estis unue portataj al staplejoj de la distribuaj sekcioj kaj poste transportataj al diversaj lokoj por disvendo, kio ofte kaŭzis ĉirkaŭ- kaj retro-portadon. Nun, la transporta sekcio povas sendi produktaĵojn de fabrikoj rekte al la lokoj de disvendado, se nur ĝi ricevas la distribuon planon de la distribuaj sekcioj; tia aranĝo kaj rapidigas la fluon de varoj kaj reduktas la transportan koston. Nun la kosto por transporti de Kantono ĝis Ĝongŝan-gubernio ĉiutunan kemisterkon malaltiĝis de 6.99 juanoj al 3.7 juanoj, dank' al apliko de tiu transporta sistemo oni ĉiujare ŝparis pli ol 98,000 juanojn kaj mallongigis la transportan tempon. Tio estas varme aprobata de la komunumanoj.

## AKCELO DE LA DISVOLVIĜO DE INDUSTRIA KAJ AGRIKULTURA PRODUKTADO

Kantono estas grava produktaĵo de sukero de nia lando, kies produktaĵo disvendiĝas en multaj provincoj kaj urboj de nia lando. La produktado de sukero koncentriĝas en certa periodo, dum



*La Hinfenga Laborsekcio de la Kantona Haveno ŝarĝas kamionojn per kansukero.*

kiu multas transporta laboro. Kiam komenciĝas la sukerprodukta sezono, ĉiutage oni devas transporti grandan kvanton da sukerkanoj al la sukerfabrikoj kaj poste transporti la produktitan sukeron al diversaj lokoj. En la pasinteco, dum tiu sezono la kontraŭdiro inter transportado kaj produktado estis relative elstara. Iuj fabrikoj devis ĉesigi produktadon pro atendado de alporto de sukerkanoj, kaj en iuj fabrikoj sukero amasiĝis kaj ne povis esti elportita. Dum la sukerprodukta sezono de 1970-1971, oni praktikis interligitan transportadon, kiu ebligis ĝustatempan kaj rapidan transporton de sukerkanoj kaj sukero, kaj fundamente solvis la problemon.

La supereco de interligita transportado montriĝas precipe en batalo kontraŭ katastrofo aŭ plenumo de aliaj urĝaj taskoj. La gubernio Longĉuan troviĝas en montregiono kun malfacila trafiko. En 1970, okazis malofta vetero de malalta temperaturo kaj pluvado je la tempo por semado de frua rizo. Kvarfoje oni semis kaj kvarfoje putriĝis la rizplantidoj. Por la kvinafoja semado,

oni devis alporti rizosemon de loko 200-300 kilometrojn malproksima. Se tio okazus antaŭ la efektiviĝo de la sistemo de interligita transportado, oni bezonus 10-15 tagojn por plenumi tiun taskon per kamionoj kaj ŝipoj kaj tio malfruigus la semadon kaj malbone influus la produkton. Sed dank' al starigo de la nova transporta sistemo, oni plene elvolvis kapablon de diversaj transportiloj kaj plenumis la transporton tage kaj nokte. Pli ol 350 tunoj da rizosemo estis senditaj al la koncernaj produktaj grupoj en nur tri tagoj kaj ĝustatempe resemataj. La vastaj amasoj de komunumanoj estis forte stimolitaj de tio kaj dank' al ilia klopodado senprecedence riĉa rikolto de frua rizo estis akirita anstataŭ reduktiĝo de rikoltaĵo.

### OPORTUNO POR LA POPOLAMASOJ

Kun la disvolviĝo de la socialisma konstruado kaj la pliboniĝo de la popola vivo, ĉiam pli multiĝas vojaĝoj de la popolamasoj por viziti parencojn kaj amikojn kaj fari aferojn. En la pasinteco, oni devis aĉeti ĉe apartaj lokoj biletojn por veturado per vagonaroj, aŭtobusoj aŭ ŝipoj kaj pro atendado de veturiloj oni malŝparis tempon kaj ofte malfruigis. Post efektiviĝo de interligita transporto,

pasageroj povas veturi en la provinco per aŭtobusoj, vagonaroj kaj ŝipoj post aĉeto de unu sola bileto kaj rapide atingi la celokon dank' al kunlaboro de la diversaj transportaj sekcioj. Ankaŭ transporton de pakajoj oni povas aranĝi sammaniere sen bezono de plenumo de komisia procedo survoje. En urboj kaj urbetoj de la provinco kie estas relative granda kvanto de pasageroj, oni ĝenerale efektiviĝas mendon kaj aĉeton de biletoj per telefono, vendon de reiraj biletoj kaj sendon de biletoj al la aĉetantoj. En la kamparo, multaj komunumoj kaj produktaj brigadoj senpage prizorgas vendadon de biletoj al pasageroj. La pli-ol-sesdek-jara komunumano Liu Juegi de la produkta brigado Dadoŭ de Ĝongŝan-gubernio foje vizitis sian filon en Guangning-gubernio antaŭ la efektiviĝo de interligita transportado. Ŝia filino devis akompani ŝin por aĉeti ŝipan kaj aŭtobusan biletojn en la gubernia urbo kaj Kantono. Kvankam de Ĝongŝan-gubernio ĝis Guangning la vojo longas nur pli ol 200 kilometrojn, tamen por tiu vojaĝo ili uzis 6 tagojn inkluzive de 3 tagoj pasigitaj en hoteloj. En novembro de 1970, ŝi denove vizitis sian filon en Guangning. La biletvendisto de la brigado sendis al ŝia domo la bileton de interligita transportado, transporta sekcio ĝustatempe veturigis ŝin al la



*Bambuoj de montregiono estas transportataj aliloken.*



gubernia urbo por veturi per ŝipo, je la sekvinta frua mateno ŝi ekveturis de Kantono al Guangning kaj atingis la cellokon posttagmeze de tiu sama tago. La vojaĝo ne estis tiel laciga kiel antaŭe kaj la kosto estis je pli ol dek janoj malpli multa. Komparante la du vojaĝojn ŝi diris kortuŝite: "La unuan fojon en mia vivo de pli ol sesdek jaroj mi vidis, ke oni povas aĉeti en la vilaĝo bileton por kontinua veturado per diversaj veturiloj. Tia bona servo de la transporta sekcio ja fruktiĝis el la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ!"

La transporta sekcio ankaŭ etendis trafikajn liniojn al lokoj, kien aŭtoj kaj ŝipoj ne atingis

antaŭe kaj aldone starigis staciojn por plibonigi la komunikadon de tiuj lokoj. De la jaro 1970, iuj sekcioj de interligita transportado starigis rilaton de transporta sekcio kun hoteloj kaj restoracioj por plifaciligi la vojaĝon de la pasaĝeroj.

La disvolviĝo de interligita transportado jam unuapaŝe manifestis ĝian superecon. Nun la transportaj sekcioj de diversaj niveloj de Guangdong-provinco estas serioze resumantaj sian sperton por ĝin perfektigi senĉese kaj fari kontribuon al la socialisma konstruado.



## *Sagaca Pramado sur Dongting-lago*

**B** EJMEN-PRAMEJO de Juejang-gubernio de Hubej-provinco situas ĉe la kuniĝejo de Dongting-lago kaj Jangzi-rivero. Ĝi estas grava trafika pasejo por la tiea popolo. La akvosurfaco ĉe la pramejo larĝas je 6 kilometroj. Tie la akvo de la lago muĝante ruliĝadas en Jangzi-riveron. Eĉ en senventa tago ruliĝas ondegoj. En ventegaj tagoj, la ondoj fariĝas ankoraŭ pli altaj, kiuj povas facile renversi malgrandajn lignajn velŝipojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, motoraj pramoj anstataŭis la malgrandajn velboatojn kaj koncernaj departementoj pri surakva trafikado

alprenis multe da rimedoj por garantii sekuran pramadon. Sed en nebulaj tagoj kaj tagoj kun 6-grada vento, oni devis ĉesigi pramadon.

Iun tagon, sur la lago blovis vento de 6 gradoj de mateno ĝis vespero. Kolektiĝis sur ambaŭbordoj pli kaj pli multaj homoj kiuj volis iri transen. Starante sur la pruo kaj rigardante la plaŭdantajn ondojn kaj la atendantajn pasaĝerojn, komunisto Ĉeng Jutaŭ, pramisto de la pramejo pensis: Ofte ventegas sur la lago kun friozaj ondoj, ĉu ni nur povas esti sklavo de la naturo? Kiel ni povos sekure veturi en ventego? La pramoj estas sti-

rataj de homoj kaj la leĝoj de akvo, ventado kaj ondado povas esti mastrataj de homoj post ilia penado.

En tiu tago li refoje studis koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj plifirmigis sian fidon koni la leĝojn de ventado kaj ondado kaj ŝanĝi la ekzistantan staton.

Li diris sian opinion al siaj kolegoj kaj ĉiuj aprobis lian ideon dirante: “Dank’ al direktado de la verkoj de Prezidanto Maŭ «Pri Praktiko» kaj «Pri Kontraŭdiro» la laboristoj de Daking konstruis la petrolkampon. Ni devas lerni de ili la revolucian spiriton kaj mastri la leĝojn de ventado kaj ondado sur la lago por veturi sekure.”

Iun posttagmezon, subite ŝanĝiĝis la vetero. Ekblovis ventego de 6 gradoj kaj ekruliĝis ondegoj. Ĉeng Jutaŭ rigardis tion kiel bonan ŝanĉon por koni la leĝojn de ventado kaj ondado. Li diris kun ĝojo: “Kiel bona vetero!” Li kaj kelkaj pramistoj vestis sin per sekuriga vesto kaj ekveturis en la lagon. Post kiam ili veturis 200 metrojn, al ili ĵetiĝis ondegoj. La ŝaŭmantaj ondegoj transflugis la stirejon kaj balancadis la pramon. Ĉeng Jutaŭ kaj maljuna rudristo Li Bingguang staris unu apud alia sur la stirejo kaj analizadis la kaŭzon. Ili trovis, ke tion estigis la irado de la pramo en direkto kontraŭ la ondoj. Se la pramo iras en la sama direkto de la ondoj, ĝi povas utiligi la repuŝan forton de la ondoj por akceli sian iradon kaj eviti renversiĝon. Ili do ŝanĝis la direkton, ekveturis zigzage kaj sukcese atingis la transan bordon. Post tio ili ofte veturadis per malplena pramo en diversaj veteraĉoj kaj faris resumon post ĉiu pramado. Post praktikado de certa tempo ili trovis iujn leĝojn de pramado en vento de 6 gradoj.

Studinte la instruon de Prezidanto Maŭ pri kapto de ĉefa kontraŭdiro, 57-jara rudristo Li Bingguang faris resumon pri la praktika sperto de sia 40-jara surakva vivo. Li trovis, ke kvankam variaj estas la faktoroj — veteroj serena, pluva, venta, neĝa kaj nebula; fluoj galopa, malforta, rapida kaj malrapida; navigejoj profunda, malprofunda, zigzaga kaj rekta en diversaj partoj — tamen ili ne ekzistas izole, sed interligite. Inter la faktoroj kiuj influas la pramadon la ĉefa estas vento. Por pli bone koni ĝin, je ĉiu ekblovo de vento li iris al la lago por observi, ĉu en tago aŭ nokto, ĉu en neĝado aŭ pluvado. Post praktikado, observado kaj resumado en pli ol 2 jaroj, Li Bingguang kaj

liaj kolegoj mastri iujn leĝojn de ventado en la kvar sezonoj. Poste ili daŭre praktikis kaj konadis, per kio ili pluapaŝe konis la rilaton inter ŝanĝiĝo de vento, leviĝo kaj malleviĝo de akvonivelo, grandeco de ondo, varieco de navigejo kaj akiris sperton por venko super ventado kaj ondado, tiel ke ili povis pli bone servi al la popolo.

Iun tagmezon, radiodisaŭdigo anoncis ŝtormalarmon. La pasaĝeroj atendantaj ĉe la pramejo timis, ke la ŝtormo venos kiam ili veturos ĝis la mezo de la lago. Maljuna rudristo Li Bingguang rigardis la ĉielon kaj diris memfide: “Ne gravas. Ankoraŭ ne kolektiĝis la pluvaj nuboj, do la ŝtormo venos post 20-30 minutoj. Se ni iom pli rapidos, ni povos atingi la transan bordon antaŭ la veno de ŝtormo.” La afero vere iris kiel li antaŭvidis. Apenaŭ la pli ol 70 pasaĝeroj atingis la transan bordon, venis ŝtormo. Ĉiuj pasaĝeroj admiris ilian precizan antaŭvidon.

Iun nokton, nebulo vualis la lagon. Du soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiuj bezonis plenumi urĝan taskon, estis turmentataj de maltrankvilo ke ili ne povas transveturi la lagon. Pramisto Li Joŭlun diris mansvinginte: “Ne timu, vi transiros.” Kiam la pramo atingis la transan bordon trairinte la densan nebulon, la du soldatoj laŭdis: “Via revolucia saĝo venkis la naturon!”

Iun majan posttagmezon de 1971, iu kampara kadro venis al la pramejo kaj diris: “Pro malvarma aerondo putriĝis la rizplantidoj de Guanghing-ĝoŭ-komunumo. Nun oni donacis al ĝi 5 kamionojn da rizplantidoj; sed difektiĝis la aŭtotransporta pramo kaj la tempo ne permesis venigi alian ŝipon. Ni intencas malŝarĝi la aŭtojn kaj peti ke vi transportu la rizidojn per boatoj.”

Tion aŭdinte Ji Jinglong pensis en si: “Subteni agrikulturon estas nia plenumenda devo. Se ni pramos la rizidojn en pluraj fojoj, ni ne nur difektos la rizidojn, sed ankaŭ prokrastos ilian transplantadon. Estas preferinde treni per motorŝipo la flosantan kajon sur kiu haltas la kvin kamionoj al la transa bordo.” Ĉiuj aprobis lian ideon.


Firme tenante la stirradon kun granda atento kaj kuraĝo, Ji Jinglong gvidis laŭ la konata vojo, jen akcelante la trenŝipon oblikve kontraŭ la torenta fluo, jen lasante ĝin malrapide flosi laŭ la ondoj. Fine li venke trenis la grandan flosantan kajon kun 5 kamionoj ĝis la transa bordo kaj ricevis laŭdon.



# Ŝton-skulpta Arto de Kingtian



Artistoj de krea grupo esploras nove kreitajn skulptaĵojn.



Sunleviĝo ĉe Ŝaŭŝan

La ŝton-skulpta arto de Kingtian havas historion de ĉ. 1,000 jaroj kaj estas unu el la antikvaj popolaj tradiciaj artoj de nia lando. La arto originas el Kingtian-gubernio de Ĝegiang-provinco.


La ŝtonoj produktitaj en Kingtian-gubernio estas brilaj, delikataj kaj diverskoloraj. La artistoj ellaboras diversajn skulptaĵojn saĝe utiligante la originajn formojn kaj kolorojn de la materialo.

En la malnova socio, la ŝton-skulpta arto de Kingtian estis ekster la "ordinaraj profesioj". Sub la reakcia regado de Kuomintango, la arto baraktis ĉe la sojlo de pereco.

Post la Liberiĝo, por pli bone disvolvi la arton, Kingtian-gubernio starigis 4 skulptejoj kun pli ol 300 artistoj. Kaj krome, pli ol 3,000 komunumanoj okupas sin per ŝton-skulptado en la sezono, kiam ne estas multaj agrikulturaj laboroj. La valoro de skulptaĵoj produktitaj en la lasta tempo 11-obliĝis kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo.

Observante la principon de Prezidanto Maŭ Zedong "utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo", la artistoj de ŝton-skulptado de Kingtian kritike heredis la tradicion kaj entuziasme faris kreadon, dank' al kio la arto donas pli brilajn florojn.






風雨送春歸，飛雪迎春到。  
喜到已是懸崖百丈冰。  
梅子黃時杏花開。



Mateno ĉe petrolkampo






Ruĝvertaj grupoj



Legomoj






Supre maldekstre: Revolu-  
cia sanktejo Jan-an

Sube maldekstre: Sorgo

Dekstre: Palestina partizano









GAN VEN:

# Historiaj Objektoj Nove Elfositaj en Gansu

EN la lastaj jaroj, oni elterigis en Gansu-provinco nombrojn da valoraj historiaj objektoj, inkluzive gravajn restaĵojn de primitiva kulturo. Tiuj objektoj prezentas riĉajn materiajn atestaĵojn por studi la disvolviĝon de nia historio kaj niajn politikon, ekonomion, kulturon, arton kaj interrilatojn kun fremdaj landoj en la antikveco.

En septembro de 1967, en Bajcaŭpo, Lintaj-gubernio, oni elfosis pli ol 340 bronzaĵojn el la frua periodo de Okcidenta Ĝou-dinastio (11-a jarcento—770 a. K.), kiuj estas sendifektaj kun klaraj surskriboj alfaritaj. Ilia formo estas simpla sed bela. Inter tiuj sin trovas ĵada ŝpateto, sur ĝi estas skulptita figuro de sklavo.

En 1967, oni trovis 17 bronzaĵojn el Kin-dinastio en Ŝangjuangia, Kin-an-gubernio, el kiuj estas bronza pezilo kun dekretoj de la Unua kaj la Dua Imperiestroj de Kin-dinastio, kio montras la unu-




Fajenca poto kun kolora desegno trovita ĉe Langou, 1966.


igon de la tuta Ĉinio kaj la starigon de centralizismo fare de la dinastio. La aliaj bronzaĵoj heredantaj la stilon de Militantaj Regnoj (476—221 a.K.) malfermis vojon al tiu de Han-dinastio (206 a.K.—220 p.K.). Aparte menciinda estas iu bronza lampo. Ĝi havas tre originalan formon. En ĝi estas tubeto, sur kiu turniĝas oleujo. La lampo havas tri oleujojn aparte uzeblajn. Post kunmeto kaj almeto de la kovrilo, oni povas ĝin kunporti dum vojaĝo. La lampo montris la teknikan nivelon de tiu tempo.

En 1969, komunumanoj de Lejtaj, Vujej-gubernio, elfosis tombon el Orienta Han-dinastio (25—220 p.K.). En la tombo oni trovis pli ol 230 objektojn el oro, bronzo, fero, ĵado, ostoj kaj

La situacio de Gansu (ombrita)



Bronza lampo de Kin-dinastio elterigita en Kin-an-gubernio, 1967.



ŝtono kaj lakitaĵojn, inter kiuj estas 14 bronzaĵoj kun sklavoj-ĉaristoj, 17 bronzaĵoj kun rajdantoj, ĉirkaŭ 30 bronzaĵoj de akompanantaj gesklavoj. Tiu tombo de Orienta Han-dinastio estas kvazaŭ "subtera muzeo". En ĝi estas trovita ankaŭ rara bronza artaĵo — galopanta ĉevalo surtretanta flugantan hirundon. Ĝia formo estas tre originala. La ĉevalo levas sian longan voston kaj fluge galopas, henante kun levita kapo. Por montri la rapidan galopadon de la ĉevalo, la artisto kun aŭdaca imago metis flugantan hirundon sub la postan dekstran hufon de la ĉevalo kies tri aliaj piedoj levigas en la aero. La artaĵo enkorpigis profundan penson kun romantisma koloro. Tiu majstra verko de la nekonata artisto antikva estis kreita tre vivece kaj bele, riĉa je imago, kaj ĝia ekvilibro estas tute firma. Tio spegulas la altan saĝon de nia laboranta popolo tiutempa. Kiam ĝi estis ekspoziciata en Langōŭ, ĉiuj rigardantoj admiris ĝin senescepte.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, en Gansu-provinco estis elterigita nombro da postrestaĵoj de primitiva kulturo. La ujo-kovrilo en formo de homa vizaĝo, elterigita en Ĉajgiaping, Tianŝuj-gubernio, en 1967, estas tipo de Jangŝaŭ-a kulturo\*. Ĝi estas fortike farita el ruĝa argilo kaj bele, precize modlita. Tio bone montras la tiaman nivelon de plastika arto. En 1966, oni

elterigis en Vangbaŭbaŭĉeng en la antaŭurbo de Langōŭ fajencajn potojn, bovlojn, vazojn kaj aliajn kun kolora desegno, kiuj estas objektoj el la tempo antaŭ 4,000-5,000 jaroj kaj apartenas al la Magiajaŭ-a tipo de Magiajaŭ-a kulturo\*\*, kiu estas iom pli malfrua ol Jangŝaŭ-a kulturo. Tiuj objektoj ne nur havas regulan formon sed ankaŭ helajn kolorojn. Ili estas faritaj fortike per subtila argilo en alta temperaturo. Sur ili estas pentritaj simetriaj desegnoj formitaj ĉefe el nigraj strioj konsistigantaj samcentrajn cirklojn kaj ondajn liniojn. Ili spegulis la tiaman teknikan nivelon de ceramiko kaj pentrado.

*\*Jangŝaŭ-a kulturo estas kulturo de nia lando antaŭ pli ol 5,000 jaroj en neolitiko. Ĝiaj objektoj estis unuafoje trovitaj en Jangŝaŭ-vilaĝo, Minĉi-gubernio, Henan-provinco, 1921, tial oni nomas ĝin Jangŝaŭ-a kulturo. La produktaj instrumentoj elterigitaj tie estas el ŝtonoj batfaritaj kaj poluritaj kaj el ostoj.*

*\*\* Magiajaŭ-a kulturo estas kulturo de nia lando de malfrua neolitiko. Ĝiaj objektoj estis unuafoje trovitaj en Magiajaŭ, Lintaŭ-gubernio, Gansu-provinco, 1923. Ĝiaj postrestaĵoj troviĝas ĉefe ĉe la riveroj Tiaŭhe kaj Dahiahe k. a. lokoj en Gansu-provinco. Oni ĉefe okupis en tiu periodo pri agrikulturo kaj uzis ŝtonajn kaj ostajn ilojn. Sur la fajencaj objektoj estis ofte kun nigraj kaj ruĝaj desegnoj.*

*Bronza pezilo de Kin-dinastio elterigita en Kinan-gubernio, 1967.*



*Ujokovrilo en formo de homa vizaĝo elterigita en Tianŝuj-gubernio, 1967.*





LONGKIAŬ:

# Kontinua Provizado de Legomaj

## Bezonoj dum la Tuta Jaro

**V**INTRE, en la legomvendejoj de Pekino estas vendataj tiel multaj specoj de legomoj kiel en la sezonoj de abundeco de legomoj. Ĉi-matene, sur la ŝoseoj en la antaŭurboj aŭtoj kaj ĉevalaj ĉaroj plenaj de legomoj kuras al la urbo. La pli ol mil grandaj kaj malgrandaj legomvendejoj en la urbo estas abunde provizitaj per brasikoj, kolzoj, florbrasikoj, rafanoj, kukumoj, kapsikoj, tomatoj ktp. por kontentigi la bezonojn de la loĝantoj.

En Pekino la vintro estas frosta kaj seka, kaj la prujna periodo sufiĉe longa, tiel ke dum ĉ. 4 monatoj en ĉiu jaro oni ne povas kulturi legomojn sub la ĉielo. En la pasinteco, malegala estis la provizado de legomoj en la 4 sezonoj. Antaŭ kelkaj jaroj, la legomproviza fako de Pekino interkonsiliĝis kun komunumanoj de la antaŭurboj kaj estis decidite ke la semado kaj livero de legomoj estos farataj en kiel eble plej diversaj periodoj, estos pligrandigita la konserva kvanto de stoko de legomoj, kaj ke la agrikulturo kaj komerco kunlaboros en plej strikta akordo, tiel ke estos garantiita sufiĉa provizo de legomoj tra la tuta jaro.

### EN LA FLANKMANGAĴA VENDEJO HONGKIAŬ

La firmo ĉefe vendas legomojn, kukojn, viandojn, manĝeblajn akvoproduktaĵojn, fruktojn k. s. En-irinte ĝin, oni tuj rimarkas la multspecajn freŝajn legomojn en grandaj kvantoj. Ili estas cetere tre malmultekostaj. Ekzemple, 1 kg. da tomato kosta 0.44 juanon, 1 kg. da kapsiko 0.34 juanon, 1 kg. da melongeno 0.38 juanon, 1 kg. da fazeolo 0.24 juanon kaj 1 kg. da karoto 0.12 juanon. En somero, la legomoj kosta pli malmulte. Ekzemple 1 kg. da tomato kosta nur 0.04 aŭ 0.05 juanon.

Post la komenco de vintro, la pekinaj loĝantoj ekaĉetas brasikojn kaj konservas por posta konsumo. Ĉiutage tiel multe da brasikoj estas liverataj al la vendejo, ke tiu devas amasigi kaj disvendi ilin eksterdome. La pekina brasiko pezas ordinare 3-4 kilogramojn. Ĝi estas tre ŝatata de la loĝantoj, kiuj aĉetas ĝin ĉiufoje en dekoj aŭ centoj da kilogramoj. Se iuj aĉetantoj ne povas mem forporti la aĉetitajn brasikojn, laborantoj de la vendejo sendas la aĉetaĵon al iliaj domoj.

La brasikoj estas dividitaj en kvar klasoj laŭ kvalito. La prezo de la unuaklasa estas 0.05 juano por kilogramo, dum tiu de la kvaraklasa estas nur 0.018 juano. La prezoj de la legomoj estas kune

difinitaj de la liverantaj popolkomunumoj kaj komercaj unuoj laŭ la politiko de prezoj de la urbaj aŭtoritatoj kaj ne povas esti laŭvole ŝanĝataj. Nur laŭ la kvalito de diversaj legomoj kaj la veteraj cirkonstancoj, oni povas fari malgrandan modifon de la prezoj en permesitaj limoj. Tial la loĝantoj de Pekino povas aĉeti saman legomon je sama prezo en ĉiu ajn kvartalo.

Por ekkoni la produktadon kaj konservadon de legomoj ĉe la produktoj, ni vizitis Longĝaŭŝu-brigadon de Hiaŭhongmen-komunumo de Ĉaŭjang-distrikto, kiu havas rektan rilaton kun Hongkiaŭ.

## ĈE PRODUKTEJO DE LEGOMOJ

Hiaŭhongmen-komunumo havas 4 brigadojn kun 37 produktaj grupoj konsistantaj el 3,100 familioj kun 15,000 membroj kaj unu grupon de

agrikultura scienca eksperimentado. Ĝi havas 734 hektarojn da kampoj, el kiuj 380 hektaroj estas uzataj por kulturado de legomoj. Post ĝia fondiĝo en 1958, la specoj kaj kvantoj de legomoj kulturataj de ĝi multe kreskis. Nun ĝi kulturas 78 specojn de legomoj kaj plejparto de ili estas kulturata plurfoje en ĉiu jaro.

Sur legomkampoj de la 11-a produkta grupo de Longĝaŭŝu-brigado, teknikisto Han Fenghaj rakontis al ni kulturadon de legomoj en vintro.

La 11-a produkta grupo ĉefe produktas legomojn. Same kiel aliaj agrikulturaj plantoj, la kreskado de legomoj estas rekte influataj de la sezonoj kaj klimato, tial konstante okazis ke la produkto de legomoj tre varias en diversaj tempoj de la jaro. En la monatoj aprilo, aŭgusto kaj septembro malabundis legomoj. La kaŭzoj estis, ke en aprilo la legomoj konservitaj en vintro jam estis forkonsumitaj kaj la nove semitaj legomoj en frua printempo

*Gvidanto de Hongkiaŭ-legomvendejo rikoltas ĉinajn brasikojn kune kun komunumanoj.*





ankoraŭ ne estis maturaj, kaj ke en aŭgusto kaj septembro abundis pluvo, la frue semitaj legomoj estis plejparte jam antaŭe rikoltitaj, dum la malfrue semitaj brasikoj kaj rafanoj ankoraŭ ne estis maturaj por provizi la merkaton.

Laŭ tiu stato, kiel ŝanĝi la sezonon de malabundeco fariĝis elstara problemo en produktado de legomoj.

En printempo de 1966, Han Fenghaj de la brigado aĉetis kvanton da plastaj membranoj por fari eksperimenton pri ŝirmado de tomataj plantoj en frua printempo. Tio estis la unua fojo de uzo de plasta membrano en ilia kulturado de legomoj, kaj multaj komunumanoj ne kredis, ke tia membrano povas konservi varmon. Sed Han Fenghaj decidis fari provon. Je la fino de marto, li plantis du bedojn da tomataj plantidoj kaj ilin kovris per plastaj membranoj. Sed neatendite blovis ventego post tri tagoj, kiu forblovis la membranojn kaj la frosto mortigis la plantidojn. Je la komenco de aprilo, li denove plantis du bedojn da tomataj plantidoj kune kun aliaj komunumanoj. De tiam Han Fenghaj ellitiĝis frue kaj enlitiĝis malfrue por observadi kaj zorge flegi la tomatajn plantidojn en tiuj du bedoj. Fine, tiuj plantoj fruktiĝis je pli ol unu monato pli frue ol kutime. El tiu sukceso, la komunumanoj ĉiuj vidis la efikon de plastaj membranoj.

Kapsiko estas unu el la ŝatataj specoj de legomo, sed en la antaŭurboj de Pekino oni kulturis ĝin nur unufoje en ĉiu jaro kaj la produktokvanto sufiĉas por konsumo de nur du monatoj. Vidante dum multjara praktikado, ke la trunko de kapsika planto estas ligneca, Han Fenghaj pensis: Se oni kreos certajn kondiĉojn por kapsiko, ĉu ĝi ne povus fariĝi plurjara planto kaj fruktadi dum pli longa periodo?

En aŭtuno de 1969, Han Fenghaj speciale lasis bedon da kapsikaj plantoj neforigitaj kaj ilin kovris per plastaj membranoj por ke ili trapasu vintron. En la sekvinta printempo, la plejparto de la plantoj jam mortis de frosto, sed nur 6 plantoj ankoraŭ restis verdaj kaj vivaj. Por liberigi la bedon, li transplantis la ses kapsikajn arbetojn en sian korton. Iu diris al li ŝerce: "Se kapsiko povus vivi du jarojn, tiam vi Hanĉjo povus vivi dufoje." Sed kiu atendis, ke la ses kapsikaj plantoj en la korto ĉiuj donis grandajn fruktojn en aprilo, dank' al zorgema flegado de Han Fenghaj.



*Legomoj en varmbudo*

La pluvivo de la ses kapsikaj plantoj donis grandan inspiron al Han Fenghaj kaj aliaj komunumanoj. Oni do plue daŭrigis eksperimenton pri kulturado de plurjaraj kapsikoj kaj fine atingis sukceson. Nun du-jaraj kaj tri-jaraj kapsikoj bone kreskas kaj abunde donas fruktojn, tiel ke en ĉiuj sezonoj, kapsikoj estas liverataj al la merkato.

### **INTER AGRIKULTURO KAJ KOMERCO**

La rekta kontaktiĝo de komerco kun agrikulturo inter la vendejo Hongkiaŭ kaj la produktanto Longĝaŭŝu-brigado efektiviĝis en printempo de 1970, por pli bone plenumi la instrukcion de Prezidanto Maŭ "disvolvi la ekonomion kaj garantii provizadon". Pro tio stariĝis Interliga Grupo de Produktado kaj Vendado konsistanta el personoj de la vendejo kaj la produkta brigado. Ili kunvenas periode je fiksitaj datoj por kune decidi la tempojn de semado kaj liverado de legomoj, plimultiĝon de konservataj legomoj kaj aliajn aranĝojn por garantii provizadon al la merkato en malsamaj periodoj.

Post starigo de tiu interligo, laborantoj de la vendejo ofte iris al Longĝaŭŝu-brigado por partopreni

fizikan laboron kaj starigis profundan amikecon kun la komunumanoj. En la pasinteco, la laborantoj de la vendejo zorgis nur pri vendado de legomoj, tamen ne sciis la kreskan staton de legomoj kaj la perspektivon de proviza situacio. Kiam elĉerpiĝis la stoko, ili sciis nur urĝigi la legomstacion por ricevi legomojn. Nun, dank' al strikta interligiĝo de la brigado kaj vendejo, la produktado kaj provizado fariĝis pli laŭplana. En la komenco de junio, 1970, granda kvanto da laktukoj estis preta por liveri al la merkato kaj laŭ la plano oni devis porti 5 tunojn al la vendejo en la 1-a de junio. Sed, ĉar la vendejo havis ankoraŭ grandan stokon, laborantoj de la vendejo interkonsiliĝis kun Longĝaŭŝu-brigado kaj decidis prokrasti la novan liveron je tri tagoj kaj evitis difektiĝon kaj perdon al la ŝtato. Ŝenoprazo estas tre bezonata spicaĵo por la loĝantoj. En tempo kiam elĉerpiĝis la stoko de konservita ŝenoprazo kaj oni devis rikolti novajn ŝenoprazojn post 3-4 tagoj, la vendejo denove interkonsiliĝis kun la produkta brigado por kontentigi la bezonojn de la loĝantoj. Komunumanoj diris: "Por kontentigi la bezonojn de la loĝantoj,

ni povas rikolti ĝin kelkajn tagojn pli frue." Ili faris kiel ili diris kaj ĝustatempe plenumis la bezonon.

La kadroj kaj reprezentantoj de komunumanoj de la brigado ofte iris al la legomvendejo por helpi vendadon.

Foje, kiam Han Fenghaj vendis legomojn tie, li rimarkis ke iuj klientoj elektadis legomojn ĉe la vendotablo kaj ŝajne trovis nenion kion ili volis. Post pridemandado, li trovis, ke ili venis al Pekino de la sudo kaj ne tre kutimiĝis al legomoj nordaj. Reveninte al la brigado, kune kun aliaj komunumanoj li multfoje eksperimentis kaj sukcesis enkonduki sudajn legomojn en sian brigadon kaj kontentigis la bezonojn de la sudodevenaj klientoj. Ĉen Lu, la estro de la 5-a produkta grupo, eĉ helpis la legomvendejon en migrada vendado de legomoj en loĝkvartalo kaj enketis opiniojn de la loĝantoj. Li informiĝis, ke multaj klientoj ŝatas tomaton, sekve la komunumanoj pligrandigis la plantareon kaj konservan kvanton de tomato kaj kulturis 6-foje anstataŭ 3-foje en ĉiu jaro, kaj tiamaniere kontentigis la bezonojn de la loĝantoj kaj ricevis ilian laŭdon.

*Legomvendejo tutjare liveras diversajn legomojn.*





# *Mongolaj kaj Hanaj Fratoj*

## *Ligiĝas Koro kun Koro*

**S**UR la stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, en bela frua aŭtuno ŝvebas maldensaj nubopecoj sub la alta ĉielo. Tie sin trovas du produktaj brigadoj, kiuj situas najbare. Unu nomiĝas Sanŝeng, kiu ĉefe okupiĝas pri agrikulturo kaj kies membroj estas hanoj, kaj la alia Haŝatu, kiu okupiĝas ĉefe pri paŝtado kaj kies membroj estas mongoloj. De longa tempo ambaŭ brigadoj formis inter si fratan rilaton, zorgante kaj helpante unu la alian.

### SENDI FURAĜON EN VENTO KAJ NEĜO

En februaro de 1971, tie neĝis sinsekve kelkajn fojojn. Sur la tero kovriĝis neĝtavolo kun dikeco de pli ol unu futo. La hanoj de Sanŝeng-brigado rigardis la neĝon kun maltrankvilo, pensante ke la mongolaj fratoj de la najbara brigado certe alfrontas malfacilojn por protekti siajn brutojn. Kaj ili tuj sendis por informiĝi pri la aferstato kaj estas konstatite ke ne sufiĉas tie furaĝo.

En la nokto la partia filio diskutis pri la urĝa demando kiel helpi Haŝatu-brigadon per furaĝo. Oni trovis ke ilia rezervita furaĝo sufiĉas nur por la propraj 2,000 brutoj. Sub la direktado de la granda instruo de Prezidanto Maŭ: **“La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero”**, ili decidis mobilizi la membrojn de la brigado por kolekti herbojn sub la neĝo kaj doni parton de la rezervita furaĝo al la mongolaj fratoj. La membraro de Sanŝeng-brigado firme subtenis la decidon

de la partia filio kaj unuanime esprimis, ke la mongoloj kaj hanoj ligiĝas koro kun koro, malfaciloj de la mongolaj fratoj estas ankaŭ la iliaj kaj ke ili nepre per agoj plenumos la linion de unuiĝo kaj venko de la 9-a Kongreso de la Partio.

En frua mateno de la sekvinta tago ĉiuj membroj de la brigado iris kolekti herbojn. Ankaŭ kelkaj maljunaj malriĉkamparaninoj iris spite al frosta vento. Ili propramane metis sur ĉaron la herbojn, kiujn ili kolektis sub la neĝo kaj diris al la kadroj: **“Nepre transdonu nian korsenton al la mongolaj fratoj!”** Baldaŭ kvin ĉaroj estis plenplene ŝarĝitaj per herboj. La plej spertaj ĉaristoj de la brigado estis komisiitaj por transporti la furaĝon al Haŝatu-brigado.

La vojo kovrita per dika neĝtavolo estis glita. La ĉielo kaj tero kunfandiĝis ĉe la horizonto. Oni ne povas vidi, kie estas la vojo kaj kie kavaĵoj. Por trovi la vojon, la brigadestro Ĝang Joŭ iris antaŭe paŝo post paŝo en la profunda neĝo. Post kvinhora malfacila baraktado oni fine atingis la celokon kun la furaĝo de pli ol 5,000 kilogramoj.

Sub la kuraĝigo de la revolucia spirito de membroj de Sanŝeng-brigado, tiuj de Haŝatu-brigado plifirmigis sian decidon venki la neĝan katastrofon, kiu estis renkontita nur en jardeko.

### HELPI SANŜENG-BRIGADON EN BRUTOGENERADO

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“preni grenon kiel ĉefĉeneron por disvolvi produktojn en ĉiuj branĉoj”**, Sanŝeng-brigado energie entreprenis ankaŭ

brutobredadon. Sed, pro manko de sperto en fekundigo de brutoj, en la printempo de 1969 nur duono de la maturaj brutinoj naskis idojn. Tion eksciinte, Haŝatu-brigado decidis doni helpon por solvi la problemon kaj komisiis la taskon al Sugegima, la plej sperta fekundigistino de la brigado. Kiam venis la fekundiga tempo en aŭtuno, Sugegima venis al la fekundiga stacio de Sanŝeng-brigado kaj fervore instruis tie la teknikon. La membroj de Sanŝeng-brigado kun dankemo diris al ŝi: “Vi faris vian plejblon por helpi nin en kreskigo de la brutaro!” Sugegima respondis: “La mongoloj kaj hanoj estas fratoj. Mi nur faris mian plenumendan taskon.”

Dank’ al la helpo de Sugegima, ĉi-foje ĉiuj maturaj brutinoj gravediĝis kaj ĝemelaj naskoj okupis 23 %.

### UNUANIMA BATALO KONTRAŬ INUNDO

Sur la vasta stepo de frua aŭtuno, ruliĝis tritikaj ondoj kaj ore flavas kolzo en la kampoj. La komunumanoj de Sanŝeng-brigado falĉis kaj samtempe draŝis la rikoltitaĵojn. Sur la paŝtejo de Haŝatu-brigado grasaj brutogregoj tie kaj tie sin paŝtis.

Sed en la tagmezo de la sekvinta tago subite ŝanĝiĝis la vetero. Pluvego falis post ektondro, tiel ke post nelonge montaj torentoj abunde alruliĝis muĝante kaj baldaŭ estis inundita la kolzo, kiun oni ĵus falĉis en kampoj de 10 hektaroj.

Pli ol kvindek membroj de Haŝatu-brigado, kiuj falĉis herbojn sur montdekklivo, vidis tion kun ĉagreno. Sub gvido de la vicestro de la brigada revolucia komitato Gonbusijen, ili vadis en akvo kun profundeco ĝis ilia talio por helpi en elsavo de la rikoltaĵo.

La akvego direktis sin al la akvobaraĵo de Sanŝeng-brigado. Tiam la membroj de Sanŝeng-brigado ne pensis pri siaj inunditaj plantoj sed zorgis pri la baraĵo. Ĉar se ĝi estos trarompita, la furaĝbazo kun areo de pli ol 60 hektaroj de la mongolaj fratoj estos difektita de la senbrida akvego. Sub gvido de Li Ĝanjuan, partia komitatano de la brigado, ili ĉiuj — viroj kaj virinoj, infanoj kaj grandaĝuloj — rapidis al la baraĵo kaj portadis al ĝi fojnon, teron kaj ŝtonojn por ripari kaj plifortiki la baraĵon.

Post duhora luktado sereniĝis la vetero. La kolzo kaj baraĵo ambaŭ estis savitaj.

### DONI URĜAN HELPON EN NEĜBLOVA NOKTO

Iun tagon en komenco de februaro 1971, furiozis frosta vento kun neĝo, kaj la kvinjara filo de la paŝtisto Gangki subite suferis gravan malsanon. La malsanuleto troviĝis en sveno. La kuracisto de la brigado tiam ĝuste estis for. Oni povis meti la esperon nur sur Vu Baŭming, la kuraciston de Sanŝeng-brigado. La plejaĝa frato de la malsanulo Batumenghe rajdis rapide al la kuracisto por peti helpon. Sed veninte al la domo de Vu Baŭming kun spiregoj, li trovis ke la kuracisto ĝuste flegis siajn du infanojn, kiuj suferis la saman malsanon kiel lia frateto. La kuracisto jam vidis la veninton, kiu ŝvitas kun neĝo sur la korpo, kaj divenis ke li certe havas urĝan aferon. Informiĝinte pri la celo de la gasto, la kuracisto tuj pretigis sian medikamentan keston por ekvojaĝo. Batumenghe iom hezitis balbutante: “Sed kiel pri viaj infanoj?” “Nun urĝas savi vian frateton. Miaj infanoj jam prenis medikamenton,” estis la respondo. Post kelka admono donita al sia edzino, la kuracisto rapide forlasis la hejmon kun Batumenghe.

La sola penso, kiu obsedis la kuraciston, estis rapide iri al la malsanulo por doni al li kuracan helpon. Kiam li fine venis al la jurto de Gangki, li tuj ekzamenis la pacienteton por fari diagnozon. Li faris injekton, donis medikamenton al la malsanuleto kaj gardis lin ĉe la lito ĝis 11-a horo nokte, kiam la malsanuleto fariĝis pli bone.

Kiam Vu Baŭming ĵus trovis tempon por iom ripozi, li ekpensis, ĉu eble en iuj aliaj jurtoj en proksimeco troviĝas mongolaj fratoj bezonantaj kuracajn helpojn. Li diris tion al Gangki kaj informiĝis, ke estas malsanulo en la familio de la paŝtisto Lahinima. Vu Baŭming tuj vadis en dika neĝtavolo por viziti la paŝtiston. Kiam la vizitata familio vidis ke li venas en neĝa nokto por doni helpon, ili ne sciis kiel esprimi sian dankemon. La tuta familio de Lahinima suferis serioze malvarmumon, kiu jam turniĝis en pulmoinflamon al du infanoj, kies vivo estis en danĝero. La profunda klasa amo kaj forta revolucia devkonscio forgesigis al Vu Baŭming lian malsaton kaj laciĝon. Li laŭvice ekzamenis la malsanulojn, faris al ili injektojn, donis medikamentojn kaj zorge flegis ilin. Dank’ al lia atentema kuracado kaj flegado, la tuta familio de Lahinima baldaŭ resaniĝis.



# Meteologia Laborantino de Paŝtregiono



KIAN PEJHENG

I

La pluvo en la nokto forlavis la polvojn en la aero super la altebenejo. En la oriento, la brulantaj nuboj pompis super la montpintoj kiel ruĝaj floroj. Blovadis malvarmeta vento kun aromo de sovaĝaj floroj kaj lakto. Kiel bela mateno!

La belaĵoj de la mateno sur la altebenejo tamen ne povis haltigi min arde dezirantan iri al kamparo. Mia kunvojaĝanto Hiujing, kiu konatiĝis kun mi nur hieraŭ, min urĝigis malpacience: “Fratino, prenu manĝon rapide, ke ni ekiru frue por atingi la komunumon Ruĝa Flago en du tagoj.”

Du ĉevaloj estis alkondukitaj, unu skarlata kaj unu neĝblanka, altaj pli ol homstature, kun longaj svingiĝantaj vostoĵoj. Ili henis kaj la foraj montoj ilin eĥadis...

Kiel interese estas rajdi sur ĉevalo! Kvankam mi prove rajdis kelkajn fojojn, tamen ankoraŭ ne lertiĝis en tio. Kompreneble mi volis provi ankaŭ ĉifoje. Sed kiam mi aŭdis la blekon, iom malvarmiĝis mia arda deziro.

Hiujing rimarkis mian timon kaj min kuraĝigis: “Surĉevaliĝu sentime, ĝi timigas vin per tio!”

Mi kolektis mian kuraĝon kaj iris al la blanka ĉevalo. Sed neatendite ĝi turnis sian postajojn kaj kalcitris kun la intenco teruri min, vidinte min fremda.

Hiujing tuj alrapidis, kaptis la bridon per unu mano kaj svingis sian pugnon kriante: “Ne estu malica!” La ĉevalo obeeme balancis siajn orelojn kaj mallevis sian kapon. Videble ĝi mildiĝis. Mi salte surĉevaliĝis imitante Hiujing.

La ĉevaloj rapidis sur la stepo, jen transiris montan torenton, jen ascendis monton. Mi tre streĉiĝis pro la balancado de supren- kaj malsuprenirado. Kvankam la stepo estis tre ĉarma, mi tamen ne havis tempon por ĝin bone rigardi. Sed Hiujing

ging gaje ekbabilis senzorge: “Fratino, rajdado estas tre amuza, kvazaŭ veturado en ŝipo balanciĝanta. Kiam plaĉas al vi, vi povas ektiri la bridon, kunpremi la gambojn kaj eksvingi la vipon por ke la ĉevalo galopu laŭ via volo!” Vidante ŝin en tia animstato mi pensis admire: “Kiel brava estas la knabino de la stepo!”

Ĉe bela loko abunda je akvo kaj herbo ni deĉevaliĝis por ripozo kaj komencis gaje interparoli.

“Hiujing, ŝajne vi ofte iras al kamparo?”

“Jes, meteologia laboranto ja ne povas tion ne fari.”

“Kial?”

“Se meteologia laboro ne ligiĝas kun praktikado, tiam ĝi ne havas signifon; kaj krome, la ĝusteco de la veterinformoj ne povas esti altigita.”

Mi ne povis kompreni ŝian parolon kaj demandis plue: “La tasko de meteologia laboranto estas observadi veterajn fenomenojn. Kian rilaton havas veterinformo kun irado al la kamparo?”

Ŝi flanken klinis sian kapon kaj detale klarigis al mi: “Tio estas tre utila! Dank’ al vizitado al la kamparo oni povas koni la formon de la tereno, lerni kaj kolekti sperton de la amasoj pri observado de vetero kaj ricevi edukon de la paŝtistoj. Kaj pli grave estas tio, ke ni povas koni la postulojn de diversaj fakoj al nia meteologia laboro por ke ni povu pli bone servi al la socialisma konstruado.” Tion dirante, ŝi elpoŝigis notlibron kaj diris montrante ĝin al mi: “La dekoj da veteraj proverboj kaj dekelkaj klimataj mapoj estas fruktoj de mia vizitado al la kamparo.”

Mi transprenis la notlibron kaj vidis, ke en ĝi estas multaj desegnoj el ruĝaj kaj verdaj strekoj, iom konfuzaj al miaj okuloj. Tamen ju pli detale mi rigardis, des pli multe mi vidis ilian utilon.

Sur la blua firmamento aperis kelkaj blankaj nuboj, kiuj rapide kuris en vento kaj disiĝis en

lanugajn pecojn tre blankajn kaj malpezajn. Aro da fortaj agloj ĉirkaŭflugadis ĉirkaŭ ili kaj levigis ĉiam pli alten, ĝisfine ili aspektis kiel kelkaj apenaŭ videblaj nigraj punktoj. Hiujing haste stariĝis kaj urĝigis min: “Ni ekiru, blovos ventego posttagmeze!”

Sur la ĉevalo mi demandis dube: “Kie oni povas trovi signon de vento en tiel serena ĉielo?”

Ŝi respondis senŝanceliĝe: “Proverbo diras: ‘Se aglo flugas alte, certe estos vento aŭ pluvo.’ Kaj krome, la ŝvebantaj nuboj nomataj ‘fragmitaj kumulusoĵ’ estas heroldoj de ventego!”

Fore ĉe la horizonto aperis kelkaj “blankaj veloj” inter la verdaj ondoj. Hiujing ĝoje ekkriis: “Jen loĝpunkto de paŝtistoj, ni prenos tagmanĝon tie!” Tion dirinte, ŝi vipis la skarlatan ĉevalon kiu tuj ekkuris rapide kiel sago. . .

Mi firme tenis la bridon, malrapidigis la spiron, metis miajn manojn al la ventro de la ĉevalo kaj lasis ĝin galopi flugrapide. Vento siblis ĉe miaj oreloj kaj en la vento aŭdiĝis ŝia arĝente sonora kanto:

*Galopas mi rapide sur la stepo, dediĉante  
Junecon mian al limregion’ de l’ patrolando.*

La paŝtista vilaĝo jam montriĝis antaŭ ni. Ŝi haltigis la ĉevalon. Sen spirego kaj ŝvito ŝi turnis sian rigardon al mi kaj diris laŭde: “Fratino, vi jam ellernis rajdadon!”

“Mi devas bone lerni de vi, stepa knabino!” mi diris post rigardo al ŝi kun profunda sento.

“Stepa knabino! Hahaha!” Laŭte ridis Hiujing. Post momento ŝi turnis sian kapon, palpebrumis kaj diris en ŝanhaja dialekto: “Sciu, ke mi estas knabino el Ŝanhajo!” Tion dirinte ŝi denove galopis antaŭen.

“Ho, knabino el Ŝanhajo!” Nur tiam mi eksciis ke ŝi estas intelekta junulino veninta al la paŝtreĝiono kaj ankoraŭ pliigis mia admiro al ŝi.

## 2

Posttagmeze, kiam ni estis survoje, vere ŝanĝiĝis la vetero: furioza ventego alblovis nigrajn nubojn de post la montoj, kaj en palpebrumo densaj hajleroj kun grandeco de soĵo komencis nin frapadi. . .

Ŝi lerte saltis de sur la ĉevalo kriante: “Fratino, tuj deĉevaliĝu kaj ŝirmu vin ĉe la ĉevalo!” Tion dirinte, ŝi rapide elprenis mezuran instrumenton kaj kuris al la deklivo, kie furiozas vento kaj

pluvo. La pluvo pli kaj pli furioziĝis. Baldaŭ la valon kovris blanka nebulo. Mi staris min premante al la ĉevalo kaj apenaŭ povis spiri en la vento kaj pluvo. Tiam ekbrilis blindiga fulmo kaj mi vidis tra la griza pluva kurteno, ke Hiujing tenis enmane anemometron kaj absorbite mezuris la rapidecon de la vento.

La vento forpasis kaj iom post iom malfortiĝis la pluvo. Saltante ŝi venis al mi kaj diris kontente: “Dankon al la ŝtormo, ke ĝi havigis al mi malfacile akireblan metean materialon. La rapideco de la ĵusa vento superis 20 metrojn en ĉiu sekundo. Hodiaŭ mi trovis alian ventoblovejon neatendite!” Sen surmeto de la pelta surtuto, ŝi malfermis la oletolan sakon, prenis el ĝi kraĵonon kaj notlibron kaj komencis skribi knare. Mi tuj surmetis al ŝi peltan surtuton kaj diris kun zorgemo: “Luktante kontraŭ vento kaj pluvo, vi ankaŭ devas surmeti pluvmantelon kaj zorgi pri via sano.”

Ŝi ĉesis skribi kaj danke rigardis min: “Ĝuste tia okazo donas al ni bonan ŝancon por esplori veteron, do kiu pensas pri tia bagatelo!”

Ĉesis la pluvo, reaperis la suno kaj malpezaj nuboj ŝvebis super la montpintoj. Ni denove surĉevaliĝis kaj galopis al la fora valo. . .

## 3

En la sekvinta tago, ni daŭre galopis antaŭen. Post nelonge, aperis antaŭ ni giganta monto. Ni rigardis supren: supre de la monto brilis arĝenta neĝo, ĉe ĝia talio ŝvebis nuboj kaj nebulo kaj zigzaga vojeto pendiĝis el la nebulo kvazaŭ jada zono. Hiujing diris al mi: “Nia celloko troviĝas ĝuste





# Kuraci Akutajn Abdomenajn Malsanojn per la Ĉina kaj Okcidenta Medicino en Kombino

**L**A akutaj abdomenaj malsanoj kiaj akuta apendicito, akuta intesta obstrukco, akuta pankreasito, ulcera akuta perforo, akuta kolecistito, kolelitiazio, galdukta askaridozo, eksterutera gravedeco aperas subite, varias rapide kaj kaŭzas akran doloron en ventro kaj sen ĝustatempa kuraco ili kaŭzas mortan danĝeron. Antaŭe oni kuracis

akutajn abdomenajn malsanojn per operacio. Nun sen operacio medicinaj laborantoj de nia lando resanigis multajn pacientojn de akutaj abdomenaj malsanoj per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. Multaj klinikaj praktikoj pruvas, ke kuraco de akutaj abdomenaj malsanoj per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino povas

post la monto. La vojo ĉirkaŭiranta la monton estas ebena, sed por esplori la sekreton de la vetero sur tiu ĉi monto, ni iru tiun danĝeran vojeton. Fratino, iru kun mi kaj vi certe vidos ion rigardindan!”

Mi diris duonserce: “Sciante ke tigro troviĝas sur la monto, vi tamen ĝin ascendas spite!”

Ni suriris kelkajn zigzagajn deklivojn kaj la vento pli kaj pli fortiĝis. La suno jam perdis la varmon kiun ni sentis ĉe la montpiedo, kaj fariĝis tre febla. Ni portis sur nin peltajn surtutojn, tamen ni ankoraŭ sentis akran froston.

Iom post iom ni iris en la naskiĝlokon de blankaj nuboj: malaperis la montoj, tumultis nubaro, nin atakis fortaj aeraj ondoj, kvazaŭ ni estus navigantaj sur maro, flosante jen supren jen malsupren senĉese. Baldaŭ ekneĝis. La neĝflokaj ŝvebis kiel miloj kaj miloj da papilioj aŭ falantaj piraj florpetaĵoj en printempa zefiro...

Trairinte la nubaron, Hiujing subite ekkriis sur la unua montpinto. Mi turnis la rigardon al la direkto montrita de ŝia mano kaj grandioza sceno falis al ni en la okulojn: furioza ventego estis pelanta multajn nubojn en la profundan valon inter du montegoj ĉe la maldekstra flanko; la vento blekadis sur la vasta tumulta nuba maro. Tio tre similis al la tumultaj ondegoj ĉe la enfluejo de la rivero Huangpu en Ŝanhajo...

Salte deĉevaliĝinte, Hiujing kaptis mian brakon kaj diris kun ĝojego: “Fratino, fine mi trovis

solvon de la problemo de multpluveco ĉe Hiumantan.”

Kun mieno de geologia trupano kiu trovis novan mineralan signon, Hiujing prenis el la oletola sako “pluvan mapon de la tuta gubernio” kaj ĝoje montris al mi: “Vidu, la stepo kun areo de centoj da kvadrataj kilometroj post la monto havas nur malgrandan pluvokvanton, sed en tiu ĉi angulo estas abunda pluvo. Ni ne supozis, ke la humida aerfluo sur la Hindia Oceano albloviĝas tra tiu ĉi loko, tial ni neniel povis kompreni la fenomenon en la observejo.” Tion dirante, ŝi faris okulfrapan signon per ruĝa kraĵono sur la mapo.

Grimpinte super la neĝan linion, la vojo fariĝis ankoraŭ pli kruta. Estis danĝere rajdi sur ĉevalo, ni do povis nur iri tirante la ĉevalojn. Apenaŭ farinte kelkajn paŝojn, mi sentis kaptur-niĝon, ne povis rapide movi la piedojn kaj spiris malfacile. Tro maldensa estis tie la aero. Tiam ni jam atingis la altecon de 5,500 metroj super la mara nivelo. Iom poste, Hiujing grimpis sur neĝkovritan deklivon kaj ĝoje komencis labori. Ĉifoje ŝi mezuris la dikecon de la neĝtavolo. En tiu momento, mi trovis ke apud neĝamaso antaŭ ŝi vidiĝas bela neĝlotuso. Mi estis mirigita de la frosto-spitanta planto sur la neĝmonto.

Survoje dum nia descendado de sur la monto, mi rigardis al la plukita neĝlotuso kaj poste al Hiujing. Tiam en mia koro leviĝis varma ondo. Mi sentis ke la neĝlotuso tre similas al Hiujing kaj Hiujing tre similas al la neĝlotuso.

malmultigi operaciojn, grandigi kuracan efikecon kaj malmultigi morton. Precipe avantaĝa estas tio ke oni povas resanigi sen operacio, kio povas ne nur eviti operacian vundon al pacientoj, sed ankaŭ ŝpari monon, tial tiu kuracmetodo estas facile disvastigebla kaj tre bonvena al pacientoj.

Laŭ la okcidenta medicino, akutaj abdomenaj malsanoj devas esti kuracataj ĉefe per operacio. Operacio povas forigi malsanan parton kaj savi pacientojn, sed ĝi ankaŭ portas al la pacientoj doloron kaj certan danĝeron; post operacio facile povas okazi infekto, adhero en abdomena kavado kaj aliaj komplikajoj, kaj iuj pacientoj eble remalsaniĝas post operacio. Por eviti operacian doloron al la pacientoj kaj grandigi la kuracan efikon, la medicinaj laborantoj de nia lando multe klopodis por serĉi novan metodon de kuraco de akutaj abdomenaj malsanoj en multaj jaroj, observante la instruon de Prezidanto Maŭ "la ĉinaj medicino kaj farmacio estas granda trezorejo kaj oni devas diligente ekspluati kaj altigi ilin". Post ripetada praktiko, medicinaj laborantoj de la provincoj Liaŭning, Ŝanhi, Hubej, Fugian, Hunan, Ŝandong kaj municipoj Tiangin, Ŝanhajo kaj Pekino trovis novan metodon de kuraco de akutaj abdomenaj malsanoj per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. En aprilo de 1971, komunumano Jaŭ Kinglu de Ŝujgaŭ-brigado en la okcidenta antaŭurbo de Tiangin suferis de akuta apendicito kun komplikajo de difuziĝema peritoneito. Kiam li estis sendita en Nankaj-hospitalon de Tiangin, jam paralizigis liaj intestoj kaj li troviĝis en danĝero. Per akupunkturo, malaltigo de premo al stomako kaj intestoj, preno de ĉinmedicina medikamento, kataplasmo, transfuzo de fiziologia solvaĵo kaj aliaj metodoj, kuracistoj malakrigis al Jaŭ Kinglu la doloron en la sama tago. En la dua tago jam moliĝis lia ventro kaj en la kvara tago li povis preni manĝaĵon. Post 10 tagoj Jaŭ Kinglu jam resaniĝis kaj forlasis la hospitalon.

Kontraŭ kolelitiazon la okcidenta medicino ĉefe aprenas la metodon de operacio. Sed la pacientoj ofte retrafas tiun malsanon post operacio kaj bezonas refojan operacion. La Medicina Instituto de Zunji de Gujĝoŭ-provinco kaj iuj aliaj koncernaj unuoj aplikis metodon de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino ĉefe uzis ŝtonsolvantan dekoktaĵon, kaj samtempe ankaŭ okcidentmedicinajn medikamentojn konstriktantajn kaj dilatantajn sfingterojn kaj aliajn metodojn, tiel ke ŝtonoj eliminiĝis tra intestoj. Ĉe pacientoj kiuj havas kompare grandajn

galŝtonojn, malvastajn galduktojn kaj pro kio al ili operacio estas neevitebla, oni operacias kaj samtempe donas al pacientoj ŝtonsolvantan dekoktaĵon, tiel ke grandaj ŝtonoj estas elprenitaj per operacio kaj eliminiĝas sablergrandaj ŝtonetoj, kiuj ne povas esti tute forigitaj per operacio. La kuraca efiko estas pli bona ol la efiko de sola operacio. En la regiono Anŝun de Gujĝoŭ-provinco estas maljuna kadro, kiu suferis kolelitiazon dum multaj jaroj. Iuj hospitaloj opiniis, ke necesas al li operacio, tamen lia sano ne permesis tion. La Medicina Instituto de Zunji de Gujĝoŭ aplikis metodon de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. Post 5 tagoj la paciento komencis elimini ŝtonojn. Post kuracado de certa tempo la paciento eliminis entute pli ol 100 ŝtonojn, el kiuj la grandaj havas diametron de centimetro kaj malgrandaj tiun de sablero. Nun la paciento jam tute resaniĝis kaj denove komencis labori.

Post longtempa praktiko estis pruvite, ke diversaj akutaj abdomenaj malsanoj povas esti kuracitaj per tia metodo. De la jaro 1962, Nankaj-hospitalo de Tiangin akceptis pli ol 5,700 pacientojn de diversaj akutaj abdomenaj malsanoj, inter kiuj pli ol 80% de la pacientoj de akuta apendicito (inkluzive de peritoneito), pli ol 90% de la pacientoj de akuta pankreasito kaj galdukta askaridozo, ĉirkaŭ 70% de la pacientoj de ulcera akuta perforo kaj pli ol 50% de la pacientoj de akuta intesta obstrukco estis kuracitaj sen operacio. En la lastaj du jaroj, la Medicina Instituto de Zunji kuracis per metodo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino pli ol 1,500 pacientojn de akuta apendicito, kolelitiazon kaj aliaj sume 8 specoj de akutaj abdomenaj malsanoj, kaj la rezulto de 90% de la kazoj estas bona. En la pasintaj pli ol 10 jaroj, la medicinaj laborantoj de la Unua Hospitalo Dependanta de la Ŝanhi-a Medicina Instituto persistis ĉe la principo de kombino de la ĉina medicino kun la okcidenta kaj kuracis sen operacio 520 pacientojn de diversaj eksteruteraj gravedecoj, per kiu metodo oni ne nur savis la pacientojn, sed ankaŭ konservis al ili naskan kapablon.

La medicinaj laborantoj de nia lando opiniis, ke en kuraco de akutaj abdomenaj malsanoj la metodo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino akiris kompare grandan sukceson, tamen ĝi ankoraŭ troviĝas en la unua stadio kaj bezonas daŭran altigon kaj disvastigon sur la bazo de multa praktikado. Ili decidis kontribui sian forton en kreo de unuecaj novaj medicino kaj farmacio de Ĉinio.



# Emeritiĝinta Kadro Vang Hijong

Fotoj de korespondanto Vej Deĝong

Vang Hijong (la dekstra)  
kolektas kuracherbojn.



Komunisto Vang Hijong, kiu laboris en hospitalo de ĈPLA en Henan-provinco, emeritiĝis laŭ decido de la partia organizo pro malbona sanstato. Forlasinte sian laborpostenon, li ankoraŭ ĉiam zorgas pri la revolucio kaj persistas en studo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Subtenate de la partia komitato de la hospitalo, li faris enketon al la amasoj en ĝiaj ĉirkaŭaj vilaĝoj, persone gustumis diversajn drogherbojn kaj post pli ol 700 eksperimentoj finfine sukcesis fari medikamentojn por ĉesigi sangadon, venkinte multajn malfacilojn. Per tiuj medikamentoj taŭgaj por engluto aŭ ŝmiro li faris novan kontribuon al la popolo.



Vang Hijong (la dekstra) lernas de maljuna kamparano konadon de kuracherboj.





Ankaŭ la gefiloj de Vang Hijong ellernis preparadon de kuracilo.



Pogrande produktita medikamento por ĉesigi sangadon







Konsultado de  
medicina literaturo



Malcedema kaj se-  
rioza eksperimentado



# Verkoj de Maŭ Zedong

*(En Esperanto)*

Pri Nova Demokratio 92-pĝ., 14.5 x 9.5 cm.

Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an  
60-pĝ., 14.5 x 9.5 cm.


Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo  
68-pĝ., 18.5 x 13 cm.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio  
de Ĉinio pri Propaganda Laboro  
32-pĝ., 14.5 x 9.5 cm.

**Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo,  
Pekino, Ĉinio**

**Distribuas la Libroservo de la Ĉina  
Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313,  
Pekino, Ĉinio**

Aĉetu ilin ĉe niaj diverslandaj perantoj aŭ rekte  
ĉe la Libroservo de ĈEL.



# Kanto de Amikeco sur Bakbo-golfo

**L**A impona montaro Ŝivandaŝan, la gaja rivero Bejlun kaj la ondanta Bakbo-golfo strikte kunligas la du socialismajn fratajn najbarojn Ĉinio kaj Vjetnamio. La loĝantoj de ambaŭ landoj trinkas el la sama rivero kaj fiŝkaptas en la sama Bakbo-golfo.

Sur la rivero Bejlun estas Ponto de Ĉina-Vjetnama Amikeco kaj ĉe ĝiaj ambaŭ finoj staras grandaj tabuloj, sur kiuj estas ruĝe skribitaj instruoj de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ **“la sepcentmiliono ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo”** kaj la instruoj de la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh **“inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja profundas amikeco: samideaneco plus frateco.”** Observante la intimajn instruojn de la grandaj gvidantoj de ambaŭ landoj, la ĉinaj kaj vjetnamaj popolanoj ambaŭborde de Bejlun-rivero subtenas kaj helpas unuj la aliajn, komponante unun post alia kantojn pri amikeco inter Ĉinio kaj Vjetnamio.

En la mezo de aŭgusto de 1971, falis pluvego kaj Bejlun-rivero abrupte ŝveliĝis eksterordinare kaj ondegaj galope ruliĝis antaŭen. Tiam kelkaj membroj de Bejgiaŭ-brigado, Donghing-komunumo de nia lando, kiuj estis elakvigantaj lignon ĉe la rivero, estis puŝitaj de torento en rivermezon. Rimarkinte la ĉinajn komunumanojn en danĝero, vjetnamaj armeanoj kaj loĝantoj trans la rivero tuj venis por savi kaj rapide surbordigis unu komunumanon kiu estis pelita de la torento ĝis iu banjano proksime de Mon Kaj (vjetnama gubernio). Sed la aliaj du ĉinaj junuloj, kiuj batalis kontraŭ la furiozaj ondegaj en la rivermezo, estis forportitaj al la malsupra parto de la rivero. La ondokrestoj galopis al la maro kvazaŭ miloj da ĉevaloj kaj la du junuloj baldaŭ estis puŝotaj en Bakbo-golfon. La vjetnamaj fratoj tute ne konsideris pri sia sekureco kaj rapidis al la furioza torento. Post streĉa batalo, ili savis la du ĉinajn fratojn kaj kondukis ilin en ilian hejmon. La vjetnamaj kamaradoj donis al ili vestojn kaj regalis ilin per manĝo, traktante ilin kvazaŭ siajn parencojn.

Informiĝinte pri tio, kamaradoj de koncernaj unuoj de la gubernio Mon Kaj venis kaj entuziasme diris al la ĉinaj komunumanoj: **“Kiel hejme vi ripozu ĉe ni hodiaŭ kaj ni tuj telefone sciigos al ĉinaj kamaradoj kaj petos ilin informi viajn hejmojn.”** En la sekvinta tago, kiam la ĉinaj komunumanoj trapasis la Ponton de Ĉina-Vjetnama Amikeco revenante hejmen, ili emociiĝis ĝis larmoj kaj elkore dankis la vjetnamajn fratojn pro la savo kaj helpo. La vjetnamaj kamaradoj diris el la korfundo: **“Ni ambaŭ popoloj estas samideanoj kaj fratoj kaj tio estas nia plenumenda devo.”**

Bakbo-golfo estas riĉa fiŝejo. De multaj generacioj, la fiŝistoj de ambaŭ landoj tie fiŝkaptas kaj havas inter si profundan amikecon. Sed post kiam la usonaj agresantoj komencis la agresan militon kontraŭ Vjetnamio, ili ofte sendas grandnombrajn aeroplanojn kaj militŝipojn por ĝeni kaj surprizi la boatojn de ĉinaj kaj vjetnamaj fiŝistoj en fiŝkaptado sur Bakbo-golfo.

Foje, nia boato fiŝkaptis sur la maro. Subite usonaj aeroplanoj alflugis, mitralpafis kaj bombis la fiŝboaton. Niaj fiŝistoj tuj heroe batalis kontraŭ ili. La boato estis trafita kaj ekbrulis la mastoj kaj veloj. Tiam al la ĉina boato rapidis vjetnama ŝipo, kiu fiŝis nemalproksime. La fratoj de ambaŭ landoj batalis kune. Post la venko de la batalo, niaj fiŝistoj kun plena revolucia amikeco dankis la vjetnamajn kunbatalantojn pro ilia helpo.

Iun fojon, vjetnamaj kamaradoj venis viziti ĉinajn fiŝistojn sin ŝirmantajn kontraŭ ventego en haveno kaj rimarkis, ke perturbiĝis la maŝino de ĉina motora velŝipo. Ili tuj venigis du teknikistojn por ekzameni kaj ripari. Kune kun ĉinaj maŝinistoj, la du vjetnamaj laboristoj faris detalan ekzamenon. Tagmeze, ĉinaj fiŝistoj prezentis al la vjetnamaj fratoj manĝaĵon, teon kaj cigaredojn kaj plurfoje petis ilin ripozi kaj daŭrigi la riparon post manĝo, sed ili firme rifuzis tion dirante, ke riparo estas pli grava. Post riparo ili faris provan navigon, kiu montris, ke la motoro estas bone riparita. En bruado de la motoro, la ĉinaj fiŝistoj kaj vjetnamaj laboristoj firme premis la manojn unu al la alia kaj iliaj koroj tute kuniĝis unu kun la alia.



# Ponto de Amikeco

**E**N novembro de 1971, laŭ la invito de la jugoslava registaro, la Ĉina Baleta Trupo kun Ĝou Kiuje kiel estro kaj Liu Kingtang kaj Diaŭ Kejuan kiel vicestroj, venis al Jugoslavio kunportante profundan amikecon de la ĉina popolo al la jugoslava, kaj faris tie vizitan prezentadon de 4 semajnoj. La trupo estis varme kaj amike bonvenigata kaj akceptata de la registaro kaj popolo de Jugoslavio dum la vizito.

La Ĉina Baleta Trupo faris 10 prezentadojn en Belgrado, Sarajevo, Ljubljana kaj Kragujevac. Estis prezentitaj la revoluciaj modernaj baletoj «Ruĝa Virina Taĉmento», «Blankhara Knabino» (fragmento), fortepiana konĉerto «La Flava Rivero» kaj aliaj kantoj kaj dancoj kiuj ricevis varmajn aplaŭdojn de la spektantoj. Ĉiufoje, kiam finiĝis prezentado, multaj spektantoj ne volis foriri kaj varme gratulis al la ĉinaj aktoroj aŭ petis iliajn subskribojn kiel memoraĵon.

La Ĉina Baleta Trupo faris specialan prezentadon por la personaro de la aŭtofabriko Ruĝa

Flago de Kragujevac. La laboristoj sentis grandan ĝojon kaj iuj eĉ venigis siajn familianojn fore je dekoj da kilometroj por rigardi la prezentadon. Iuj laboristoj varme diris: “La popoloj de Ĉinio kaj Jugoslavio havas saman revolucionan travivaĵon. La prezentaĵo estas intima por ni, kaj pli firmigas la amikecon inter niaj popoloj.”

Post rigardo de «Ruĝa Virina Taĉmento» iu respondeculo de la Sarajeva Teatro diris: “Via baletto estas komprenebla por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj estas bona al la amasoj. Ni profunde sentas, ke arto devas proksimiĝi al la popolo.” Baletistino Minka Kamboroviĉ diris al siaj ĉinaj kolegoj: “Tiel en la sento, kiel en la movoj via baleta arto estas bona kun granda infekta povo. Mi estis emociita ĝis larmoj dum la spektado.”

Dum la vizito en Jugoslavio, la Ĉina Baleta Trupo trovis grandan helpon fervore donitan de multaj jugoslavaj amikoj, en kio montriĝis la profunda amikeco inter la popoloj de la du landoj.



*Artistoj de Ĉinio kaj Jugoslavio*



*Membroj de la Ĉina Baleda Trupo gastas ĉe iu maljuna ŝaktisto de Jugoslavio.*

Profesoro Novakoviĉ de Belgrada Konservatorio multe helpis ĉinajn aktorojn en lernado de jugoslavaj kantoj foroferante sian ripozon. Tio multe kortuŝis la ĉinajn kamaradojn. Krome, Novakoviĉ varme akceptis ĉinajn gastojn en sia hejmo kaj rakontis al ili sian travivaĵon en gerila taĉmento dum la kontraŭfaŝisma milito kaj la bravan kontraŭagresan batalon de jugoslava popolo por nacia sendependeco. Li montris al la ĉinaj amikoj sabrojn, glavojn, ĉaspafilojn k. a. armilojn uzitajn de la generacio de lia patro en batalo kontraŭ agreso. Montrante armilojn pendantajn sur la muro Novakoviĉ diris: "La jugoslava popolo estas gastama, tamen ĝi ne permesas agreson. Kiam venas amikoj, ni varme akceptas ilin, kiel ni nun akceptas vin, se venas homoj kun malbonaj intencoj, ni traktas ilin per armiloj."

La ŝoforo Drago, kiu tagnokte stiris aŭton por la baleta trupo, fariĝis bona amiko de la ĉinaj aktoroj. Foje, iuj ĉinaj kamaradoj aranĝis la scenejon ĝis la kvara matene kaj ankoraŭ ne revenis al la hotelo. Informiĝinte pri tio Drago tuj direktis sian aŭton al la teatro por reporti ilin. Kaj en la tago li ĝustatempe stiris aŭton por porti la ĉinajn aktorojn al la teatro, kie ili devis ekzerci sin. La ĉinaj aktoroj petis lin ripozi, sed li respondis: "Por mi estas ĝojo, ke mi povas resti kun ĉinaj kamaradoj kaj fari ion por ili."

Ĝuste kiel jugoslavaj amikoj diris, la vizitado de la Ĉina Baleta Trupo konstruis inter la popoloj de Ĉinio kaj Jugoslavio novan ponton de amikeco. Kun la senĉesaj intervizitoj de la popoloj de ambaŭ landoj, certe pli disvolviĝos la amikeco inter ili.



*Aktoroj de la Ĉina Baleda Trupo kaj jugoslava fervojisto kune kantas en vagono fragmenton el «Ruĝa Signal-lanternino».*



# Forta Kondamno al la Hinda Registaro pro Ĝia Agreso kontraŭ Pakistano

**L**A armita agreso de la hindaj reakciuloj kontraŭ Pakistano estas neevitebla rezulto de ĝia obstina antaŭenpuŝado de la ekspansia politiko.

En marto de 1971, la hinda registaro jam komencis krude interveni en la internajn aferojn de Pakistano, subtenante la pakistanajn splitistojn per diversaj rimedoj. Poste, ĝi elkovis la t.n. "Bengalan Provizoran Registaron", kiu efektive estas starigita sur la teritorio de Hindio kaj ekspedis t.n. "liberajn batalantojn" en la orientan Pakistanon por armita ribelo kaj renversa aktivado. De la 20-a de oktobro, 1971, hindaj trupoj publike faris grandskalan armitan invadon al la orienta Pakistano kaj trudis la pupan reĝimon de la t.n. "Bengala Lando" al Pakistano por atingi sian longe celatan anekson de la orienta Pakistano. La faktoj klare montras, ke la hinda registaro estas malkaŝa agresanto.

La batalo inter la hindaj reakciuloj en unu flanko kaj la pakistanaj registaro kaj popolo en la alia flanko estas batalo inter interveno kaj kontraŭintervenado, batalo inter renverso kaj kontraŭrenverso kaj batalo inter agreso kaj kontraŭagreso.

La ĉinaj registaro kaj popolo atente observas la disvolviĝon de la situacio de la Hinda-Pakistana Subkontinento. De ĉiam ni pledas por tio, ke la internaj aferoj de ĉiu lando devas esti solvitaj de ĝia propra popolo kaj konfliktoj inter ŝtatoj devas esti solvitaj tra interkonsiliĝo de la koncernaj landoj. Ni firme oponas kontraŭ interveno en internajn aferojn de aliaj landoj, faro de armita agreso kaj okupo de alilanda teritorio, sub ia ajn preteksto.

Huang Hua, konstanta reprezentanto de la Ĉina Popola Respubliko al la Sekureca Konsilantaro de la Unuiĝintaj Nacioj, faris paroladon en la urĝa kunveno de la konsilantaro en la vespero de la 4-a de decembro de 1971, en kiu li forte kondamnis la hingan registaron pro ĝia armita agreso kontraŭ Pakistano kaj ĝia kruda interveno en internajn aferojn de Pakistano kaj reasertis, ke la ĉinaj registaro kaj popolo firme subtenas Pakistanon en ĝia justa batalo kontraŭ la armita agreso kaj politika renverso de Hindio.

Huang Hua denove proklamis la solenan starpunkton de la ĉinaj registaro kaj popolo. Li montris:

"1. La problemo de la orienta Pakistano estas pure interna afero de Pakistano, en kiun neniu havas rajton interveni. Estas netolerebla, ke la hinda registaro faras armitan agreson kontraŭ Pakistano uzante la problemon de la orienta Pakistano kiel pretekston.

"2. La hinda registaro asertis, ke ĝi sendis trupojn al la orienta Pakistano por 'memdefendo'. Tio estas pure rabista logiko. La faktoj montras, ke estas Hindio kiu faris agreson kontraŭ Pakistano, sed ne Pakistano kiu 'minacis' la sekurecon de Hindio. Laŭ la logiko de la hinda registaro, ĉiu ajn povas uzi la pretekston de 'memdefendo' por invadi aliajn landojn. Tiam do kia garantio ankoraŭ estas por la suvereneco kaj teritoria integreco de diversaj landoj?

"3. La hinda registaro asertas, ke la celo de ĝia sendo de trupoj al la orienta Pakistano estas helpi la rifuĝantojn de la orienta Pakistano por

*La popolo de Dacca de Pakistano manifestacias por protesti kontraŭ la agreso de Hindio al Pakistano.*



reveni al sia hejmlando. Tio estas tute ne pravigebla. Nun en Hindio estas granda nombro da tiel nomataj 'rifuĝantoj' el Tibeto de Ĉinio; la hinda registaro ankaŭ bredas Dalaj Lama, la ĉefon de la tibeta kontraŭrevolucia ribelo. Laŭ la aserto de la hinda registaro, ĉu ĝi ankaŭ uzos tion ĉi kiel motivon por agresi kontraŭ Ĉinio?

“4. La pakistana registaro proponis, ke la armitaj fortoj de ambaŭ flankoj retiriĝu de la landlimo respektive kaj apartiĝu kaj ke la problemo de la rifuĝantoj de la orienta Pakistano estu solvita per intertraktado inter la du registaroj. Tio ĉi estas tute justa. Tamen la hinda registaro malracie rifuzis ĝin. Tio montras, ke la hinda registaro tute ne intencas solvi la problemon de la rifuĝantoj de la orienta Pakistano, sed utiligi tiun ĉi problemon kiel pretekston por estonta renverso kaj agreso kontraŭ Pakistano.”

Huang Hua montris: “La ĉina delegacio opinias, ke laŭ la Ĉarto de la Unuigintaj Nacioj, la Sekureca Konsilantaro devas forte kondamni la agresajn agojn de la hinda registaro kaj postuli ke la hinda registaro senprokraste kaj senkondiĉe retiru ĉiujn hindajn armitajn fortojn el Pakistano.”

La ĉina popolo kaj la pakistana popolo de ĉiam simpatias kaj subtenas unu la alian en la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj ekspansiismo. La batalo de la pakistanaj registaro kaj popolo kontraŭ la agreso de Hindio estas justa. La ĉina popolo firme subtenas la pakistanajn registaron kaj popolon en ilia batalo por defendi la suverenecon kaj teritorian integrecon kaj kontraŭ deekstera agreso. Se la hindaj ekspansiistoj agos sen konsidero pri alies opinioj, ili certe forbruligos sin en fajroludo kaj trafos hontindan malvenkon.



## Enciklopedieto

### LA ORIENTA KAJ OKCIDENTA PARTOJ DE PAKISTANO

**P**AKISTANO situas sur la Hinda-Pakistana Subkontinento. Ĝia teritorio konsistas el la orienta Pakistano kaj la okcidenta Pakistano, kiuj distancas unu de la alia je pli ol 1,600 kilometroj kaj inter kiuj troviĝas Hindio.

Post la Dua Mondmilito, en 1947 Britio devigite konsentis al sia kolonio Hindio sendependiĝon. Sur la Hinda-Pakistana Subkontinento fondiĝis la Hinda Federacio kaj la Pakistana Islama Respubliko, kies landlimoj estas determinitaj laŭ religia kredo de la loĝantoj. Pli ol 88% de la loĝantoj de Pakistano kredas islamon.

Pakistano havas la teritorion de 946,000 kvadrataj kilometroj kaj ĉ. 130,000,000 loĝantojn,

el kiuj 89% estas en la kamparo. Ĝia ĉefurbo estas Islamabad.

La orienta Pakistano kun amplekso de 143,000 kvadrataj kilometroj konsistigas 16% de la totala teritorio de Pakistano, sed ties loĝantaro okupas 56% de ĝia totala nombro. Dacca estas la ĉefurbo de la orienta Pakistano. La orienta Pakistano situas en la malsupraj partoj de la riveroj Ganges kaj Brahmaputra kaj ĉe la Bengala Golfo. Ĝi najbaras kun Hindio en okcidento, nordo kaj oriento kaj kun Birmo en sudoriento. Plejparto de la tero sin trovas en la delto de Ganges, kie dense interplektiĝas riveroj kaj sterniĝas preskaŭ tute fekun-

da aluvia ebenejo. Ĝi abunde produktas rizon kaj juton kaj estas plej riĉa agrikultura kaj fiŝprodukta regiono de Pakistano.

La okcidenta Pakistano limtuŝiĝas kun la Araba Maro sude, kun Hindio oriente, kun Afganio nordokcidente kaj kun Irano okcidente. La plejparto de ĝiaj regionoj estas montara, la rivero Indus trafluas la landon de nordo ĝis sudo. Tie abunde produktiĝas tritiko, kotono kaj maizo.



Skiza Mapo de Pakistano





## **POPOLANOJ DE DACCA, CHITTAGONG KAJ ALIAJ URBOJ MANIFESTACIIS POR PROTESTI KONTRAŬ LA HINDA AGRESO**

La grandskala invado fare de Hindio kontraŭ la orienta Pakistano vekis fortan indignon ĉe la pakistana popolo. De la 28-a de novembro, 1971, popolanoj de Dacca, Chittagong kaj aliaj urboj de la orienta Pakistano ĉesigis negocon kaj okazigis mitingojn kaj manifestaciojn por protesti kontraŭ la agreso fare de Hindio kontraŭ Pakistano.

La popolo de Chittagong faris grandiozan manifestacion. La manifestaciantaj amasoj laŭte kriis sloganojn kondamnantajn la hindajn agresantojn kaj alvokis al la popolo, ke ĝi unuiĝu por frakasi la senhontan invadon de Hindio al la sankta teritorio de Pakistano. Poste, la amasoj kunvenis. Delegito de studentoj alvokis en sia parolado al la pakistanaj popolanoj, ke ili sin pretigu por oferi sian vivon por defendi la patrolandon.

En la sama tago, ankaŭ popolanoj de Sylhet kaj Comilla manifestaciis kaj kunvenis por protesti kontraŭ la hinda agreso kontraŭ Pakistano. La reprezentantoj de diversaj rondoj, kiuj faris paroladon en la kunvenoj, forte kondamnis Hindion pro ĝia krima intrigo displitigi Pakistanon kaj alvokis, ke la popolo solide unuiĝu kiel granito por kontraŭbatali la hindajn agresantojn.

## **NEPALAJ GAZETOJ KONDAMNAS HINDION PRO ĜIA AGRESO KONTRAŬ PAKISTANO**

Ĉefartikolo de la semajna gazeto «Patrolando» diras: “Agresi alian landon aŭ interveni en internajn aferojn de alia lando kun ĉia ajn preteksto aŭ ĉia ajn sofismo estas karakterizaĵo de imperiisma lando.” “Sendube miriga estas tio, ke Hindio, kiu nomas sin lando eksterbloka kaj demokratia, publike pravigas sian agreson kaj armitan atakon kontraŭ la orienta Pakistano.”

La ĉefartikolo kondamnis Hindion, ke ĝi faris militan aktivadon por premi Pakistanon. Ĝi diras: “Hindio devas ĉesigi sian danĝeran agadon de invado al la orienta Pakistano kaj agreson kontraŭ Pakistano sub la preteksto de memdefendo. Hindio ne devas doni ian ajn helpon al la elementoj kiuj intencas deigi la orientan parton de Pakistano.”

Tiu semajna gazeto avertas, ke Hindio “mem pereigos sin utiligante la problemon de rifuĝantoj por prepari militon”.

Ĉefartikolo de la ĵurnalo «Lingvo» montras, ke la problemo de la orienta Pakistano estas interna afero de Pakistano. “Fremdlanda interveno estas kontraŭ internacia leĝo. Ĝi ne nur detruas la mondan pacon sed ankaŭ atencas interesojn de la popolo.”

La ĉefartikolo diras: “Entrudiĝi en alian landon transpasante ĝian limon certe estas agresa ago.” “Jessore estas parto de la teritorio de Pakistano. Se Hindio ekspedis tankojn kaj trupojn al tiu loko, tio ja estas agreso.”

## **LA POPOLAJ NACILIBERIGAJ ARMITAJ FORTOJ DE KAMBOĜO EKSTERMIS PLI OL 1,700 MALAMIKOJN EN LA ĈIRKAŬAĴO DE PNOMPENO**

Post akiro de grava venko ĉe Rum Luong sur la ŝoseo n-ro 6, de la 7-a ĝis la 21-a de novembro de 1971, la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo faris atakojn kontraŭ multaj fortikitaj punktoj de la defenda linio de la malamiko sude kaj sudokcidente de Pnompeno, repuŝis la 5 helpajn brigadojn de la malamiko kaj akiris novan venkon.

Laŭ nekompleta statistiko, en 15 tagoj la naciliberigaj armitaj fortoj detruis la fortikitajn punktojn de Baset, Angkor Krous, Along Romeas, Toul Leat kaj Baku, rompis la defendan linion de la malamiko sudokcidente de Pnompeno, komplete ekstermis 2 batalionojn kaj 7 rotojn de la malamiko, forte difektis 6 batalionojn kaj multajn rotojn de la malamiko, mortigis kaj vundis kaj kaptis 1745 malamikojn,

La naciliberigaj armitaj fortoj ankaŭ faligis 6 malamikajn aviadilojn, detruis 1 ponton, kaptis kaj detruis centojn da armiloj kaj multe da militaj materialoj.



## Balenĉasa Grupo

*La balenŝipo Juanlong persekutas balenon.*

**P**ROFUNDIĜIS nokto. Blovis frosta vento sur la maro. Sur la balenŝipo la fiŝistoj plenatente observis la surfacon de la maro. Subite aŭdiĝis susurado. Baleno ŝprucigis akvon! La baleno pli kaj pli proksimiĝis kaj ĉiam pli laŭtiĝis la akvoŝpruciga bruo. Ili rapide sin pretigis por ĉaso. La baleno naĝis de la pruo al la poŭpo kaj poste en inversa direkto, levante ondojn. Ili bone celis al ĝi kaj ekpafis. Pum! — la baleno estis trafita. Ĝi faris baraktadon kaj fine estis kaptita.

La laboranta balenĉasa grupo de la Kompanio de Akvaj Produktaĵoj de la urbo Ljuda, Liaŭning-provinco, estis fondita en 1958. En la pasintaj dekelkaj jaroj, la balenĉasistoj navigadis sur la vasta fiŝejo spite al ventoj kaj ondoj klopodante por krei riĉaĵon por la socialisma patrolando.

En la pasinteco, oni ĉasis balenojn nur en tago, ĉar de tempo al tempo ili devas sin levi al la surfaco de la maro por spiri elŝprucigante akvon, per kio la ĉasistoj povas ilin trovi. Resumante sian sper-ton en ĉasado de baleno, la fiŝistoj trovis la agadan kutimon de balenoj kaj konstatis ke delfenoj ŝatas petoli ĉirkaŭ ŝipo ne nur en tago sed ankaŭ en nokto kaj komencis kapti balenojn tage kaj nokte.

En la komenco, la fiŝistoj ekfaris observadon en diversaj direktoj je vesperiĝo. De vesperiĝo

ĝis profunda nokto kaj de profunda nokto ĝis mateniĝo, ili observadis du tagojn, tamen trovis neniun balenon. Analizinte la ĉirkaŭan maron, ili konstatis, ke la ankrejo estas fore de la centro de la fiŝejo kaj krome tie mankas por balenoj plej bona logaĵo, nome malgrandaj salikokoj. Se oni ankras vespere ĉe centro de la fiŝejo abunda je malgrandaj salikokoj, balenoj pli ŝatas petoli ĉirkaŭ la ŝipo. Kaj krome, oni lasis la ŝipon flosi per ĉesigo de la motor-funkciado anstataŭ ankri la ŝipon por ke ĝi povu tuj ekagi je trovo de baleno ne fortimigante ĝin.

En la lastaj jaroj, la balenĉasistoj grandigis la nombron de kaptitaj balenoj en ĉiu jaro, venkinte diversajn naturajn malfacilojn.


Iun matenon, la balenŝipo Juanlong pretiĝis veturi al la fiŝejo. Subite ŝanĝiĝis la vetero kaj ekpluvegis torente. Sur la senlima maro, subite ekblovis ventego kaj leviĝis altaj ondoj, tiel ke la rigardo estis barita. En tia malfavora kondiĉo, la fiŝistoj veturigis Juanlong en la balenkaptejon. Por bone trovi balenon, la observanto sur la gvatejo simple deprenis la protektajn okulvitrojn kaj ankaŭ ĉiuj fiŝistoj de la ŝipo venis sur la ferdekon kaj observadis plenatente en la vento kaj pluvo.

“Jen bartobaleno antaŭ ni!” Aŭdiĝis averto sur la gvatejo kaj la fiŝistoj tuj iris sur sian postenon. La baleno pli kaj pli proksimiĝis je



300 metroj, 200 metroj... la ruza besto jen plongis al la marfundo, jen naĝis supren al la surfaco kaj penis forfuĝi tutforte. La balenŝipo Juanlong postkuris ĝin plenvapore. La baleno kuris ĉiam pli rapide kaj la ŝipo pli kaj pli proksimiĝis al ĝi. "Pum!" la baleno estis trafita! La tuta ŝipo ekbolis de ĝojo.

En 1971, la balenĉasistoj plivastigis sian laboron—ili kunportis ĉirkaŭreton por kapti fiŝojn kiam ili ne trovas balenon. Iafoje, ili trovas kaj balenon kaj fiŝaron, ili do kaptas kaj balenon kaj fiŝojn. Dum la fiŝsezono en printempo, la grupo akiris riĉan rikolton kaj de balenoj kaj de fiŝoj.



45-tuna baleno



## Maljuna Brigadestro kaj Nova Kontisto

**J**AM estis profunda nokto, sed ankoraŭ brilis la lampo en la oficejo de Daĝaj-brigado kaj el ĝi de tempo al tempo aŭdiĝis krakado de abako. Ĉe la tablo sidis maljunulo pli-ol-50-jara, atente rigardanta junulon, kiu kalkulis per abako kaj faris notojn en kontlibro.

La maljunulo estis la estro de la brigado kaj la junulo nova kontisto, kiu ekokupis tiun postenon en somero de 1970.

Ĉar la antaŭa kontisto Ĝaŭ Suheng estis sendita por lerni en Kinghua-universitato, Pekino, en somero de 1970. En la adiaŭa kunveno aranĝita por li, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝojis pro la fakto, ke ilia ido havas la eblecon unuafoje viziti universitaton, kaj samtempe devis diskuti, kiu plenumu la laboron anstataŭ la forironto. Tiam Ĉen Jongguj diris, montrante la junulon apudsidantan: "Ĉu tiu knabo ne

taŭgas?" Tuj kelkcent paroj de okuloj sin turnis al la junulo.

La junulo estis Ĝaŭ Cuntang. Li estis lernanto de la naŭa klaso de Daĝaj-lernejo. Post diskuto ĉiuj konsentis, ke Cuntang estas bona kamparanido kaj ke li plenumu la gravan laboron de kontisto. Tamen, Cuntang ruĝiĝis honteme balbutante: "Onklo Jongguj, mi ne estas kompetenta por tio."

"Ne timu," tuj kuraĝigis lin brigadestro Gia Ĉengjang, kiu sidis apud li, "akceptu la laboron, kaj mi helpos vin. Ellernu librotenadon, prizorgadon de mono kaj distingon inter malamikoj, niaj propraĵoj kaj amikoj, vi certe plenumos bone la laboron."

De tiam, la brigadestro, kiu laboris kiel kontisto en la komenca periodo post la fondiĝo de Daĝaj-brigado, ofte helpis lin en lernado de librotenado.

Post la enoficiĝo kiel kontisto, Cuntang devis samtempe viziti lernejon, partopreni en kolektiva produktado kaj plenumis la laboron de kontisto. Konsiderante, ke la laboro estas tro peniga, li ekhavis la penson pri forlaso de la ofico. Tion rimarkinte, Gia Ĉengĵang iris fari korverŝan interparolon kun li.

Vidante la grandajn okulojn de Cuntang, Gia Ĉengĵang tuj ekmemoris la heroan figuron de Ĝaŭ Hiaŭhe, la patro de Cuntang, kiu ĉiam zorgis pri la kolektivo kaj bedaŭrinde oferis sian vivon en la batalo kontraŭ la natura katastrofo en 1964. Gia Ĉengĵang rakontis al li, kiel lia patro fariĝis komunisma batalanto el ordinara komunumano kaj diris: "Vi estas posteulo de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj devas lerni de via patro, bone teni financan potencon por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj tutkore servi al komunumanoj."

Sub la sugestado de la brigadestro kaj en rememoro de la sinofera spirito de la patro, Cuntang ekhavis kuraĝon. Li garantiis al la estro: "Mi

nepre faros ĉion por venki malfacilojn kaj bone plenumos la laboron."

Por solvi liajn malfacilojn, la brigadestro helpis lin konvene uzi la tempon. Tage: tempo por viziti lernejon, vespere: por noti kontolibron, kaj matene: por labori en kampo.

Vidinte, ke Cuntang diligente lernas kaj baldaŭ posedis la profesiajn sciojn, la maljuna brigadestro tre ĝojis en la koro. Sed post nelonge li rimarkis, ke Cuntang malmulte partoprenas en fizika laboro kaj cetere aperis ĉe li ĝermo de neatento pri ŝparo, li do pliafoje faris kun li korverŝan interparolon. Li rakontis al li, kiel li mem laboris kiel kontisto, kaj admonis: "Vi estas ankoraŭ juna. Krome, kiel kontisto, via laboro multe rilatas kun mono, do vi nepre ne apartiĝu de la amasoj kaj fizika laboro, kaj ĉiam vivu en penemo kaj mallukso!"

Sub la zorga helpado de la maljuna brigadestro, Cuntang korektis siajn mankojn, rigore sekvante liajn konsilojn, kaj pro tio estas multe laŭdata de la amasoj.

---

ĉar mi devas labori longan labor-tagon.

redakcio) mi jam tradukis kaj publikigis kun mallongigoj en nia universitata gazeto «Studento».

#### SKRIBIS ALBANA LEGANTO

B. M.

Plimultiĝis la temoj priskribitaj. Dank' al abunda kvanto de paĝoj oni povas kontentigi gustojn diversspecajn per legado.

Al mi persone, kiel kutime, plaĉas artikoloj pri edukado kaj pri studo kaj apliko de filozofiaj instruoj en vivo kaj laboro. Bonŝance vi donas koncernan atenton al tiuj temoj. La artikolon pri edukado en kombino kun produkta laboro kun paroloj de ĉinaj studentoj kaj instruistoj de Kinghua-universitato (t.e., la artikolo «Instruistoj kaj Lernantoj Parolas pri la Eduka Revolucio» aperinta en n-ro 9 de 1971.— La

#### SKRIBIS ĈEĤOSLOVAKA LEGANTO F.K.

Ke tiu ĉi via klopodo sukcesas, oni povas konvinkiĝi laŭ bildoj publikigitaj en via revuo. Ili pravas ankaŭ labor-entuziasmon ĉefe de junaj homoj kaj en ĉiuj sferoj de agado.

Per kolorbildoj de diversaj lokoj de Ĉinio ni, alilandanoj, interkonatiĝas kun beleco de via grandega lando. Krom tio min interesas vizitoj de diversaj ŝtatestroj en Ĉinio kaj ankaŭ tiuj bildoj, kiuj demonstracie montras kunlaboron de ĉinaj fakistoj kaj scienculoj kun kolegoj de aliaj landoj.



#### SKRIBIS ISLANDA

LEGANTO K. S.

De la artikoloj mi lernas ion pri via fora lando. Mi mem estas nur ordinara homo kaj estas scivolema pri vivostato de ordinara ĉino. Mi ŝatas artikolojn, ekzemple, «Amikeca Intervidiĝo» kaj «Fremdlandaj Maristoj en Ĉinio» (Vidu n-ro 7 de 1971). La finnoj estas preskaŭ niaj najbaroj. Mi estas eksmaristo, kiu nun laboras sur seka lando.

Ĉiam mi bonorde ricevas «El Popola Ĉinio», kaj ĝi estas nun preskaŭ tro granda por mi tutlegi,





### MALGRANDAJ CEMENTEJOJ

Ĝis la fino de novembro de 1971, la 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando jam konstruis pli ol 1,800 malgrandajn cementejojn, el kiuj la plejparto estas konstruita en la lastaj jaroj. Ili dislokiĝas en 60% de la gubernioj de nia lando. Ili produktas 40% de la cemento de nia lando kaj efike subtenas la irigacian konstruadon kaj lokajn industriojn.

### DISVOLVIĜAS LA KEMIA INDUSTRIO DE GILIN

En la lastaj jaroj, rapide disvolviĝis la kemia industrio de Gilin-provinco en nordorienta Ĉinio. La provinco havas ne nur nombron da grandaj kemiindustriaj entreprenoj, sed ankaŭ starigis pli ol 160 mezajn kaj malgrandajn.

Kun disvolviĝo de la kemia industrio, la specoj de la produktitaj kemiaĵoj multe kreskis kaj la produkta povo senĉese grandiĝas. En 1971, la specoj de la produktaĵoj de tiu ĉi provinco kreskis je pli ol 100 specoj kompare kun tiuj de 1970 kaj estas kvaroblo de tiuj de 1965. La produktokvantoj de sinteza amoniako, koncentrita azota acido, kaŭstika sodo, kalcia karbido, tinkturo, plastiko, polivinila klorido, polivinila alkoholo kaj aliaj gravaj produktaĵoj pliiĝis respektive je 10-100% kompare kun tiuj en la sama periodo de 1970.

### ABUNDA RIKOLTO DE URSAJ GALVEZIKOJ KAJ ALIAJ LOKAJ PRODUKTAĴOJ DE LEJE

En 1971, Leje-gubernio de Guanghi akiris riĉan rikolton de ursaj galveziĵoj, mosko, feloj de montaj meloj, mielo, *Tangŝen (Codonopsis pilosula)*, pangolinaj skvamoj kaj aliaj lokaj produktaĵoj. Ili kreskis je 20-30% kompare kun tiuj en 1970. Tie oni vendis pli ol dek milojn da peltpecoj, kiuj estas pli multaj kaj bonaj ol tiuj en iu ajn pasinta jaro.

### SUKCESA BREDADO DE MARĈEVALOJ

Ŝanvej-bredejo de Hajfeng-gubernio de Guangdong-provinco sukcesis en bredado de marĉevaloj. La marĉevaloj ekbreditaj en la komenco de 1971 jam generis 12 grupojn da marĉevalidoj. Tri el la 12 grupoj jam maturiĝis kaj ankaŭ la aliaj marĉevaloj kreskas bone.

Marĉevalo estas mara fiŝo. Ĝi estas valora farmacia drogo kaj bone efikas en kuraco de ĥirurgiaj kaj nervaj malsanoj. Ĝi similas al ĉevalo kaj povas kreski ĝis 30 centimetroj. Ili ŝatas vivi en maro kun riĉaj *virgulari*-oj kaj rifoj kaj estas malfacile kapteblaj. Marĉevalidoj maturiĝas 100 tagojn post sia eloviĝo.

### NORDAJ LUTREOLOJ LOĜIĜIS ĈE HONGZE-LAGO

Hongze-gubernio de Giangsu-provinco sukcesis bredi ĉe Hongze-lago lutreolojn, kiuj estas valoraj bestoj de malvarma regiono. La 50 lutreoloj unuafoje alportitaj en 1968 nun plimultiĝis per generado ĝis 1,090. En la lastaj du jaroj, la bredejo jam liveris al la ŝtato 314 lutreolajn felojn, kies kvalito kaj koloro atingis la difinitan normon de la ŝtato.

## Sur la kovrilo:

Laboristoj de la Pekina Me-  
tiarta Fabriko elfaris belegan  
cervan ĉaron, kombinante la  
teknikojn de klozoneo, filigrano,  
ebura kaj jada skulpto, in-  
krusto k.a.

## Sur la dorskovrilo:

Akvokonservejo Gongŝang en  
irigacia regiono de la kanalo  
Ruĝa Flago en Lin-gubernio de  
Henan-provinco. Ĝi konservas  
gigantan kvanton da akvo.

Foto de Li Jongtan

## Korespondi Deziras

\*S-ro Grigoraŝ Florian, str. Smir-  
dan 64, Iași, Rumanio, 28-j. fizikis-  
to, kun samfakuloj.

\*S-ro Roŝca Lucian-Ziurel, Bul.  
București Noi 97, B-3, sc. C-101,  
București 26, Rumanio, 24-j. studen-  
to, kun latinamerikaj kolegoj.

\*F-ino Florica Popescu, str. Ion  
Creanga 8, Faltiĉeni, Rumanio, 22-j.  
profesorino, kun gekolegoj.

\*S-ro Giovanni Marella, Via Paolo  
della Valle 5, 80126 Napoli, 18-j.,  
dez. interŝ. bk.

\*F-ino Isabella Mingo, Via Mario  
Ruta 7, 80128, Napoli, 12-j. lernan-  
tino, kun kolegoj el Rumanio kaj  
Pollando.

\*S-ro Stefan Furdek, Hybel 665,  
Trstena, okr Dolny Kubin, 17-j.  
lernanto, kun kolegoj el Rumanio,  
Japanio, Aŭstralio.

\*S-ino Hemerkova Milada, str. J.  
Wolkra 2071, Pardubice, 45-j. oficis-  
tino, kun samaĝaj geesperantistoj.

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (163) 1972

## Ĉefa Enhavo


Bejjuan-a Popola Komunumo en Antaŭenmarŝo .....	1
Kondukanto en Ŝanĝo de la Postiĝinta Fizionomio de Ŝangjaŭ .....	6
Vizito al Anfeng-lago .....	10
La Nuna Cajdam .....	13
Naskiĝo de Nova Teknologio .....	17
Interligita Transportado de Guangdong-provinco .....	20
Sagaca Pramado sur Dongting-lago .....	23
Historiaj Objektoj Nove Elfositaj en Gansu .....	25
Kontinua Provizado de Legomaj Bezonoj dum la Tuta Jaro .....	27
Mongolaj kaj Hanaj Fratoj Ligiĝas Koro kun Koro .....	31
Meteologia Laborantino de Paŝtregiono .....	33
Kuraci Akutajn Abdomenajn Malsanojn per la Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj en Kombino .....	35
Kanto de Amikeco sur Bakbo-golfo .....	38
Ponto de Amikeco .....	39
Forta Kondamno al la Hinda Registaro pro Ĝia Agreso kontraŭ Pakistano .....	41
Balenĉasa Grupo .....	44



# Novaj Produktaĵoj de Ŝanhajaj Laboristoj




En la jaro 1971, la laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la Fabriko de Ŝaltuboj de Malnormalaj Formoj de Ŝanhajo multigis la formojn kaj materialojn de tuboj je pli ol 200 specoj. Lastatempe ili sukcesis fabriki novtipan malnormalan tubon.








La ŝanhaja metalurgia fronto nun ĉiujare povas produkti pli ol 1.000 specojn de ŝtalo kaj pli ol 10.000 specojn de ŝtalaj materialoj. Sur la bildo: Laboristoj de la Ŝanhaja Unua Ŝtala kaj Fera Fabriko ingotigas bolŝtalon uzatan en produkto de veldvergoj.



Malgranda ŝanhaja laminata fabriko «Batalo» faras grandan kontribuon kaj ekde 1971 produktis por la ŝtato pli ol 70 urĝe bezonatajn specojn de ŝtalaj materialoj de malnormalaj formoj. Ĝi a foto montras dentajn ŝtalstangojn produktitajn per simpla ekipaĵo.





Laboristoj de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko lastatempe sukcese produktis multkapablan grandan precizan spiralan frotummaŝinon bezonatan por la disvolvo de industrioj de precizaj maŝinoj, pezaj maŝinoj kaj aeroplanoj de nia lando.

La Fabriko de Silicia Ŝtalplato de Ŝanhajo je 64 tagoj pli frue plenumis la produktan planon de 1971. La fabriko bonigis la kvaliton de siaj produktaĵoj, multigis iliajn specojn kaj malaltigis ilian memkoston.





32-tunaj aŭtoj projektitaj kaj fabrikitaj de la Ŝanhaja Aŭtofabriko efike subtenas la konstruadon de minejoj.



Laboristoj de la Fabriko de Pneumatikaj Instrumentoj de Ŝanhajo sukcese fabrikis pneumatikajn borilojn kun subtenilo, kiuj faciligas la laboron de laboristoj, bezonas nur po 1 manipulanton anstataŭ 3 kaj trioble grandigas la labor-efikon.



# Unuiĝu por Gajni Ankoraŭ pli Gran- dajn Venkojn

Ĉefartikolo de la ĵurnalo *Renmin Ribao*,  
la gazeto *Hongqi* kaj la ĵurnalo *Jiefangjun Bao*  
por la Novjara Tago de 1972

**El Popola Ĉinio, N-ro 2, 1972**





# Unuiĝu por Gajni Ankoraŭ pli Gran- dajn Venkojn

Ĉefartikolo de la ĵurnalo *Renmin Ribao*,  
la gazeto *Hongqi* kaj la ĵurnalo *Jiefangjun Bao*  
por la Novjara Tago de 1972

**F**ORPASIS la triumfa jaro 1971. Brave marŝante antaŭen laŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando kun plena fido eniris en la batalan jaron 1972.

Kiam la mondo eniris en la sepdekajn jarojn, Prezidanto Maŭ montris en sia deklaro de la 20-a de majo 1970: “**La danĝero de nova mondmilito ankoraŭ ekzistas, kaj la popoloj de ĉiuj landoj nepre devas sin prepari. Sed, nun la ĉefa tendenco de la mondo estas revolucio.**” La disvolviĝo de la internacia situacio en la pasinta jaro pluapaŝe konfirmis tiun ĉi sciencan tezon de Prezidanto Maŭ.

En la pasinta jaro, la tuta mondo troviĝis en intensa tumulto. Ĉiuj fundamentaj kontraŭdiroj en la nuna mondo akriĝis senescepte. Precipe la kontraŭdiroj inter la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo en unu flanko kaj ĉiuj popoloj

de la mondo, inkluzive de la usona kaj sovetunia popoloj, en la alia, kaj la kontraŭdiroj inter la du superpotencoj en konkurado por monda hegemonio kaj divido de influferoj fariĝis ankoraŭ pli akraj kaj vastigitaj. La agreso, renverso, superrego, interveno kaj tiranado fare de imperiismo kaj social-imperiismo incitis la popolojn de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj la aliajn popolojn de la mondo amase leviĝi al batalo kontraŭ ili. Lokaj militoj inter agreso kaj kontraŭagreso kaj inter revolucio kaj kontraŭrevolucio neniam ĉesis. La imperiisma tendaro splitiĝas. La reviziisma kliko disfalas tagon post tago. La diverslandaj reakciuloj vivas en konstanta paniko. Diversaj politikaj fortoj pluapaŝe dividiĝas kaj reorganiziĝas. La karakteriza trajto de la hodiaŭa monda situacio povas esti resumita en unu vorto “tumulto”, aŭ “tumulto tra la mondo”. En tiu situacio, la politika konscio de la

proletaro kaj la popoloj de diversaj landoj rapide altiĝas, la marksism-leninismaj partioj kaj organizoj spertas hardadon en la batalo, kaj la revoluciaj movadoj de la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj ankoraŭ pli profundiĝas. La revoluciaj bataloj vigle ŝveliĝas de la strategiaj postfrontoj de imperiismo ĝis la “koraj” regionoj de kapitalismo. Landoj volas sendependiĝon, nacioj volas liberiĝon kaj la popoloj volas revolucion, ĉi tiu granda historia fluo forte atakas la kadukan regadon de imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj.

La usona imperiismo neniam troviĝis en tiel malfacila stato kiel hodiaŭ. Ĝia kontraŭrevolucia tergloba strategio senĉese trafas malvenkojn. Ĝiaj agresaj fortoj estas ege malpliigitaj de la grandaj venkoj de la popoloj de la tri landoj Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo en ilia kontraŭusona naciisava milito, la disvolviĝo de la batalo de la palestina kaj aliaj arabaj popoloj kontraŭ la uson-izraela agreso, la leviĝo de la revolucia amasa movado de la usona popolo kaj la ŝveliĝo de la batalo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo. Rezulte de la grandega ŝanĝo en la ekvilibro de fortoj inter Usono en unu flanko kaj Japanio, Okcidenta Eŭropo kaj aliaj kapitalismaj landoj en la alia, pli kaj pli intensiĝis ilia batalo por transmeti krizojn unu sur alian kaj konkuri por merkatoj kaj krudmaterialaj bazoj, kaj Usono renkontis la plej seriozan defion en la 26 jaroj post la Dua Mondmilito. Ĉio ĉi tio pluapaŝe seriozigis la politikan, ekonomian kaj socian krizojn en Usono.

Sekvante la spurojn de la usona imperiismo, la sovetunia reviziisma social-imperiismo etendas ĉien siajn manojn sub diversaj trompaj montro-tabuloj. Samtempe kun subpremado al la popolo de ĉiuj naciecoj de Sovetunio, la renegata kliko de Breĵnev plenforte klopodas por superregi kaj ekspluati la popolojn de la aliaj landoj en la tiel nomata “komuneco”

kaj furioze ekspansiigas siajn influferojn en diversajn regionojn de la mondo, kaj tiel ĝi metas pli kaj pli multajn pendigmaŝojn ĉirkaŭ sian propran kolon. En la pasinta jaro, la sovetunia reviziismo koluziis kun la usona imperiismo en nukleaj negocoj, subskribis la interkonsenton pri Okcidenta Berlino forvendantan la suverenecon de la Germana Demokratia Respubliko, faris renversadon en multaj landoj, minacis Balkanion, subfosis la armitan batalon de la palestina kaj aliaj arabaj popoloj kontraŭ la uson-izraelaj agresantoj kaj, precipe, senhonte kaj senskrupule subtenis la hindajn reakciulojn en ilia armita agreso kontraŭ Pakistano. Ĉio ĉi tio pluapaŝe malkaŝis ĝian social-imperiisman vizaĝon antaŭ la tutmondaj popoloj, kaj ĝi trafis ilian fortan kondamnon kaj falis en pli kaj pli izolitan pozicion.

Prezidanto Maŭ montras: **“Aferoj en la mondo bezonas interkonsiliĝojn. La internaj aferoj de lando devas esti solvitaj de la popolo de tiu lando, kaj la internaciaj aferoj devas esti solvitaj de ĉiuj koncernatoj tra interkonsiliĝoj kaj ne devas esti deciditaj de la du grandaj potencoj.”** Forpasis jam la epoko, kiam reprezentantoj de la du superpotencoj povis decidi laŭplaĉe la sorton de aliaj landoj sidante kune kaj farante postkulisajn negocojn. Pli kaj pli multaj mezgrandaj kaj malgrandaj landoj unuiĝas por oponi kontraŭ la hegemoniismo kaj potenca politiko de la du superpotencoj, la landoj de la tria mondo ludas ĉiam pli pozitivan rolon en la internaciaj aferoj, kaj ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj suferas agreson, renverson, superregon, intervenon kaj tiranadon fare de la du superpotencoj, formas vastan unuecan fronton. Tio estas grava tendenco en la nunaj internaciaj rilatoj. Ĉe la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, estis rompita la obstrukco fare de la usona registaro kaj estis adoptita per superega plimulto la rezolucio pri restarigo de la laŭleĝaj rajtoj



de nia lando en la Unuiĝintaj Nacioj kaj tuja forpelo de la reprezentantoj de la Ĉiang-kajŝeka kliko el la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj organizoj subordigitaj al ĝi, kaj ankaŭ kontraŭ la volo de la sovetunia social-imperiismo, la rezolucio postulanta de ambaŭ flankoj Hindio kaj Pakistano pafĉesigon kaj retiron de iliaj armitaj fortoj estis adoptita per superega plimulto de 104 voĉoj. Ke mezgrandaj kaj malgrandaj landoj povas ludi tian inspiran rolon en la Unuiĝintaj Nacioj tra siaj komunaj penoj, la voĉo de justeco povas okupi tian superan pozicion kaj la du superpotencoj, Usono kaj Sovetunio, falis en tian izolitecon, tio neniam okazis en la pasinteco. La ŝanĝoj en la Unuiĝintaj Nacioj estas viveca speguliĝo de la bonega internacia situacio.

Sed imperiismo, social-imperiismo kaj la diverslandaj reakciuloj ne volantas akcepti siajn malvenkojn kaj ĉiam furioze faras barakton kaj daŭre kondukas subfosadon. La faktoj en la pasinta jaro ankoraŭfoje vivece pruvis, ke ju pli malfacilaj estas iliaj tagoj, des pli freneze ili faras agreson, intervenon kaj renverson, kaj eĉ senskrupule provokas novajn agresajn militojn. Tial, la popoloj de diversaj landoj devas teni altan singardemon, senĉese resumi sperton, plifortigi sian unuiĝon, pligrandigi siajn fortojn kaj persisti en batalo por gajni novajn venkojn.

En la pasinta jaro, la popolo de nia lando efektivigis la revoluciajn linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ en eksteraj aferoj kaj akiris gravajn venkojn. Nia popolo, kune kun la popoloj de aliaj landoj, faris firman batalon kontraŭ imperiismo, ekspansiismo, nova kaj malnova koloniismo, kaj kontraŭ la hegemoniismo kaj potenca politiko de la du superpotencoj. Nia revolucia amikeco kun frataj socialismaj landoj disvolviĝis pluapaŝe, kaj ni marŝis antaŭen ŝultro-ĉe-ŝultre kune kun la Albana Partio de Laboro kaj ĉiuj aliaj veraj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj

de la tuta mondo en la batalo kontraŭ la moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro. Nia batala unuiĝo kun la popoloj de la tri landoj Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo en la opono kontraŭ la agreso de la usona imperiismo des pli solidiĝis; ni strikte kunagadis kun la popoloj de Koreio, Japanio kaj aliaj aziaj landoj en la batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj la japana militarismo; ni kaj la arabaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj subtenis reciproke en la kontraŭimperiisma batalo. De la pasinta jaro, la amikecaj kontaktoj de nia popolo kun diverslandaj popoloj senĉese disvolviĝas, niaj rilatoj de kunlaboro kun multaj amikaj landoj des pli kreskas, nia lando starigis diplomaciajn rilatojn kun pliaj 15 landoj, kaj precipe niaj laŭleĝaj rajtoj en la Unuiĝintaj Nacioj estas restarigitaj; tio plene montris la ĉiam pli kreskantan internacian influon de nia socialisma patrolando. Ĉio ĉi tio inspiras nin pene lukti kun plenplena fido por daŭre efektiviĝi la revoluciajn linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ en eksteraj aferoj.

La pasinta jaro estas jaro de granda venko en **konduko de edukado pri ideologio kaj politika linio** tra la tuta Partio kaj inter la popolanoj de la tuta lando. Laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ, tra legado kaj studado, opono kontraŭ aroganteco kaj rompo de memkontentiĝo, kritiko al reviziismo kaj ĝustigo de laborstilo, la tuta Partio puŝis profunden la batalon inter la du klasoj, la du vojoj kaj la du linioj kaj plifirmigis kaj disvolvis la atingojn de la Granda Proletara Kultura Revolucio. La vastaj amasoj de kadroj kaj partianoj, precipe la altrangaj kadroj de la Partio, serioze legas verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj tio paŝon post paŝo fariĝas komuna kutimo. Ili altigis sian kapablon distingi la veran Marksismon de pseŭdomarksismo, pluapaŝe malkaŝis kaj kritikis la intri-

gojn de tiaj trompistoĵ kia Liu Ŝaŭki, kiuj havis sekretajn rilatojn kun fremdaj landoj kaj vane provis ŝanĝi la linion kaj politikojn de la Partio kaj la socialisman sistemon. La tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo pli kompakte unuiĝas ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ. Tio havas profundan signifon por solidigo de la proletara diktaturo kaj prevento de kapitalisma restaŭro en nia lando, kaj estas tre peza bato al social-imperiismo kaj al imperiismo, reviziismo kaj la reakciuloj tra la mondo. Tio estas granda venko de la proletaro kaj la tuta popolo de Ĉinio, granda venko de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La venka disvolviĝo de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj la penetriva konduko de edukado pri ideologio kaj politika linio ekscitis la socialisman aktivecon de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj revoluciaj intelektuloj kaj puŝis industrion, agrikulturon, komercon, sciencon kaj teknikon, kulturon kaj edukon kaj ĉiujn aliajn aferojn al senĉesa disvolviĝo; nia socialisma konstruado prosperas. En 1971, ni sukcese plenumis la batalajn taskojn de la unua jaro de la Kvara Kvinjara Plano por Disvolvo de la Nacia Ekonomio. La totala produkto-valoro de industrio kaj agrikulturo kreskis je ĉirkaŭ 10 procentoj kompare kun tiu en 1970. En agrikulturo riĉrikoltoj estis akiritaj en dek sinsekvaj jaroj. Malgraŭ la relative seriozaj naturaj katastrofoj, la grena produkto de 1971 superis tiun de riĉrikolta jaro 1970, atingante 246 milionojn da tunoj. Komencis realiĝi la tasko elmetita de Prezidanto Maŭ **ŝanĝi la situacion transporti grenon de la sudo al la nordo**. La industria produktado kontinue leviĝis, la kvalito de produktaĵoj altiĝis kaj iliaj specoj plimultiĝis. Kompare kun 1970, la produktokvanto de ŝtalo kreskis je 18

procentoj kaj atingis 21 milionojn da tunoj. Tio markas, ke la tuta industrio leviĝis al nova nivelo. La fundamenta konstruado iris relative rapide. En la tuta lando la prezoj restas stabilaj kaj la merkato prosperas. La materialaj rezervoj de la ŝtato kaj la popolo pluapaaŝe plimultiĝis. La vivo de la popolo certgrade pliboniĝis. Nemalmultaj novaj disvolviĝoj kaj kreoj okazis en la revolucio sur la kultura kaj eduka frontoj. La nivelo de scienco kaj tekniko de nia lando plue altiĝis en certa grado. La Popola Liberiga Armeo fariĝis ankoraŭ pli forta, kaj nia nacia defendo estas senprecedence firmigita.

Prezidanto Maŭ montras: **“La linio estas la ĉefĉenero; post kiam ĝi estas kaptita, ĉio povas esti facile solvita.”** Nia laboro en la pasinta jaro plene konfirmis la ĝustecon de tiu ĉi tezo. En la nova jaro, la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo devas daŭre penetrive konduki edukadon pri ideologio kaj politika linio, plifortigi la partian gvidon, profundigi la batalon, kritikon kaj reformon sur ĉiuj frontoj, puŝi la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon al ankoraŭ pli granda disvolviĝo, pluapaaŝe solidigi la proletaran diktaturon kaj firme plenumi la linion formulitan de la Naŭa Kongreso de la Partio, **unuiĝu por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn**.

En konduko de edukado pri ideologio kaj politika linio kaj disvolvo de la movado por kritiki reviziismon kaj ĝustigi la laborstilon, estas necese, laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ, preni kiel gravan enhavon la jenon: **Praktiku Marksismon, kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu honestaj kaj malkaŝemaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn**. Ĉu praktiki Marksismon aŭ reviziismon, tio ĉiam estas la kerno de la batalo inter la du linioj. Estas necese daŭre penetrive disvolvi la amasan movadon de studo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso,



**serioze legi kaj studi kaj bone kompreni Marksismon kaj konduki bone la revolucion amasan kritikon por elimini la venenan influon de la reviziisma linio.** Estas necese kombini teorion kun praktiko kaj la historian batalon kun la aktuala kaj pluapŝe klare distingi: Kio estas la marksism-leninismaj linio kaj politikoj de Prezidanto Maŭ, kio la kontraŭ-marksism-leninismaj linio kaj politikoj de tiaj trompisto kia Liu Ŝaŭki; kio estas la materiisma teorio de reflekto, kio la ideisma apriorismo; kio estas la socialisma vojo, kio la kapitalisma vojo; kaj kio utilas al firmigo de la partia gvido, kio forpuŝas aŭ malfortigas la partian gvidon. Prezidanto Maŭ ĉiam pleonas por honesteco kaj malkaŝemo. La kontraŭrevoluciaj aktivadoj de tiaj trompisto kia Liu Ŝaŭki por restaŭri kapitalismon estas ekstreme izolitaj en la tuta Partio kaj la tuta armeo kaj inter la popolo de la tuta lando kaj ne povas sin montri sub la taglumo, tial ili povas nur sin turni al konspiroj kaj intrigoj kaj al mensogo kaj kalumnio. Persistante je honesteco kaj malkaŝemo, ni povas distingi kaj kontraŭstari la kontraŭpartian kaj kontraŭpopolan nigran venton kaj senĉese plifortigi la partian unuiĝon. Prezidanto Maŭ montras: **“Kio estas la unuiĝo de ni parolata? Kompreneble ĝi estas unuiĝo bazita sur Marksismo-Leninismo, kaj ne estas senprincipa unuiĝo.”** **“Estas necese unuiĝi kun la plejmulto kiel en la Partio tiel ankaŭ ekster ĝi, nur tiam la aferoj povos esti bone faritaj.”** Ni [devas, laŭ tiu ĉi instruo de Prezidanto Maŭ, unuiĝi kun la plejmulto, inkluzive de tiuj, kiuj antaŭe oponis al ni erare kaj sincere korektas siajn erarojn. Profunda konduko de edukado pri ideologio kaj politika linio certe altigos la konscion de la tuta Partio kaj la tuta popolo pri daŭrigo de la revolucio sub la proletara diktaturo kaj ege antaŭenpuŝos ĉiujn laborojn.

Konduko de edukado pri ideologio kaj politika linio devas esti kombinita kun

la taskoj de batalo, kritiko kaj reformo. La celo de la movado de batalo, kritiko kaj reformo en la Granda Proletara Kultura Revolucio estas, laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, reformi ĉiujn partojn de la superstrukturo nekonformajn al la socialisma ekonomia bazo kaj efektiviĝi la taskon solidigi la proletaran diktaturon en ĉiu baza unuo. Nur tenante edukadon pri ideologio kaj politika linio, oni havas ĝustan direkton en konduko de batalo, kritiko kaj reformo sur ĉiuj frontoj kaj povas ilin konduki profunden. La movado de batalo, kritiko kaj reformo disvolviĝas malekvilibre, ankoraŭ troviĝas multaj neplenigitaj laboroj, ankoraŭ ekzistas malfortaj ĉeneroj kaj unuoj, kaj ankaŭ aperas iuj novaj problemoj, kiuj devas esti solvitaj. Ni devas analizi la situacion, resumi sperton, studi politikojn kaj fari ĉiuf flankan planadon, por ke nia laboro estu pli bone konforma al la objektiva realo.

Estas necese daŭre plifortigi la unuigitan gvidon de la Partio, plifortigi la ideologian kaj organizan konstruadon de la partiaj komitatoj kaj partiaj filioj, fari bone la laboron **elimini malfreŝaĵon kaj enpreni freŝaĵon** laŭ la partiaj principoj kaj fari bone la amasan laboron inter la laboristoj, kamparanoj, junuloj, virinoj, intelektuloj kaj aliaj. La partiaj organizoj devas persisti en la amasa linio, esti lertaj en koncentrado de kolektiva saĝo, plifortigi enketon kaj studon, preni bone tipajn ekzemplojn kaj doni konstantan atenton al efektiviĝo de la instruo de Prezidanto Maŭ **“Zorgu la vivon de la amasoj, priatentu metodojn de laboro”**. Estas necese persisti pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro kaj oponi kontraŭ la korodo de la burĝaro. Komunistoj devas persisti en principoj kaj kuraĝi batali kontraŭ ĉiuj eraraj tendencoj kontraŭaj al Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Prezidanto Maŭ diras: **“La konstanta principo de nia Partio en traktado al kamaradoj farintaj**

erarojn estas meti la ĉefan emfazon sur edukon, nome, lerni el pasintaj eraroj por eviti estontajn kaj kuraci la malsanon por savi la pacienton.” Ni devas daŭre efektivi tiun principon kaj, sub la gvido de la proletaro, unuiĝi kun ĉiuj unuigeblaj fortoj.

Prezidanto Maŭ alvokas: **Lernu de Daking en industrio, lernu de Daĝaj en agrikulturo, la tuta lando lernu de la Popola Liberiga Armeo, kaj la Liberiga Armeo lernu de la tutlanda popolo.** Ni devas, sekvante ĉi tiun instruon de Prezidanto Maŭ, impulsi la revolucion amasan movadon sur ĉiuj frontoj vigle disvolviĝi. La vastaj revoluciaj amasoj en la kampoj de industrio, agrikulturo, komerco, scienco kaj tekniko, kulturo kaj eduko kaj aliaj devas daŭre disvolvi la spiriton de penega lukto kaj sinapogo sur propraj fortoj, ĉiuflanke efektivi la orientilon **teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito** kaj, streĉante plene la energion kaj strebante forte antaŭen, plenumi kaj superplenumi la ŝtatan planon multe, rapide, bone kaj ekonomie, por renkonti la kunvokon de la Kvara Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj. La Ĉina Popola Liberiga Armeo devas, laŭ la armeokonstrua linio de Prezidanto Maŭ, plifortigi la armeokonstruon, kaj firme teni militan kaj politikan trejnadon por pluapaŝe altigi sian politikan kaj militan kvaliton. Estas necese plifortigi milican konstruon. Estas necese **subteni la armeon kaj amzorgi la popolon, subteni la registaron kaj amzorgi la popolon**, kaj tiel plifortigi la unuiĝon inter la armeo kaj la registaro kaj la unuiĝon inter la armeo kaj la popolo. Estas necese firme bati la subfosajn aktivadojn de la kontraŭ-revoluciuloj. La armeanoj kaj popolanoj de la tuta lando devas serioze studi la internacian situacion kaj la partiajn linion kaj politikojn en eksteraj aferoj, **altigi singardemon, defendi la patrolandon, fari**

bone preparon kontraŭ agresaj militoj kaj firme frakasi ĉiujn intrigojn de agreso kaj renverso fare de imperiismo kaj social-imperiismo.

Kiam la nova jaro alvenas, ni esprimas nian profundan zorgon al la samlandanoj en Tajvan. Tajvan-provinco estas neapartigebla parto de la ĉina teritorio. La samlandanoj en Tajvan estas niaj sangaj fratoj. Liberigi Tajvan estas interna afero de Ĉinio, kaj estas malpermesate al iu ajn fremdulo interveni en tion. Ni firme oponas kontraŭ tiaj absurdaĵoj, kiel “unu Ĉinio, unu Tajvan”, “unu Ĉinio, du registaroj”, “la pozicio de Tajvan restas nedefinita”, “sendependa Tajvan” kaj similaj intrigoj. Ĉiuj armitaj fortoj de Usono nepre devas retiriĝi el Tajvan kaj Tajvan-markolo. La ĉina popolo nepre liberigos Tajvan! Ni estas konvinkitaj, ke tiu tago certe venos.

Ni jam akiris grandajn atingojn. Tamen, nia lando ankoraŭ estas lando disvolviĝanta, nia ekonomio ankoraŭ estas relative postiginta kaj la taskoj de revolucio kaj konstruado ankoraŭ estas tre pezaj. Niaj atingoj estas nedisigeblaj de la subteno kaj helpo de la proletaro kaj la revoluciaj popoloj tra la tuta mondo. Ni devas daŭre plenumi nian internaciisman devon kaj firme subteni la justan batalon de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo. Vizaĝante al la novaj batalaj taskoj en- kaj ekster-landaj, ni devas esti modestaj kaj singardemaj, esti liberaj de fiereco kaj malpacienco, devas ankoraŭ pli diligente studi, ankoraŭ pli energie labori kaj klopodi por **fari pli grandajn kontribuojn al la homaro per novaj venkoj.**

Vivu la venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando!



# Historiaj Restaĵoj

Kolora fajenca poto de neolitiko (antaŭ 5,000 — 6,000 jaroj), elterigita en 1956, en la gubernio Tianŝuj de Gansu-provinco.



Bronza galopanta ĉevalo surtretanta flugantan hirundon de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K), elterigita en 1969, en la gubernio Vuvej de Gansu-provinco.

